

中國報

EL POPOLA


ĈINIO



- Nova disvolvigo de la ĉina scienco kaj tekniko
- Somera tago en Pekino
- Esperanto en la okuloj de emerita diplomato
- Servo al fremdlandanoj en Pekino







## INTER NI

Kun granda intereso mi ankaŭ ĉiam legas la artikolojn de serio Por Via Sano kun bona sukceso. Mi volas doni du ekzemplojn por tio. En n-ro 6/87 kaj 8/87 estas skribite kiel oni povas per masaĝo sanigi diversajn korppartojn kaj reguligi la sangopremon. Mia edzino jam suferis pli ol 20 jarojn de spasmoj, ĉefe ĉe la maldekstra piedo, preskaŭ ĉiam se ŝi volis dormi. Kiam ŝi komencis antaŭ unu jaro per la masaĝo kiel estas skribite en 6/87, tre baldaŭ la spasmoj estis for. Antaŭ ĉirkaŭ 7 semajnoj ŝi komencis per la masaĝo de la kapo kiel estas skribite en 8/87 kaj ankaŭ tio jam efikis bone. Ankaŭ tiun malsanon ŝi jam havis dum multaj jaroj.

**H. DIETRICH (DDR)**

Ricevinte vian unuan ĉi-jaran numeron, mi estis ĝojigita pro plibonigo de ĝia enhavo kaj plibeligo de ĝia aspekto. Kun granda intereso mi tralegis ĉiujn artikolojn kaj informojn en ĝi aperigitajn. Nomi la plej interesan artikolon estus afero vere malfacila, ĉar laŭ mia opinio ĉiuj estas interesaj. Ekzemple tiu "Pezaj Bazarkorboj" — pri evolutempo de la ĉina nacio, kiam prezoj kaj salajroj kreskas — pri la periodo, nomata de la fakuloj "periodo de drasta ŝanĝigo de ekonomia mekanismo". La vojo al bonhaveco de la ĉina nacio estas certe malfacila kaj oni devas ellabori politikon por bremsi inflacion kaj prelevigon.

Mi aprobas vian novan ŝanĝon en transskribo de la ĉinaj propraj nomoj, lanĉita de januara numero en EPĈ. Tio certe utilas al la unueco de la ĉinaj propraj nomoj en latinigita transskribo kaj eliminis miskomprenon.

**J. TOMIŠEK (Ĉeĥoslovakio)**

# ENHAVO

- 41 **Nova disvolviĝo de la ĉina scienco kaj tekniko**  
 19 La hodiaŭaj Shu-vojoj (II)  
 6 **Somera tago en Pekino**  
 54 **VOJAĜO LAŬ YANGZI-RIVERO (33):**  
 Chongming-insulo, brila perlo en la draka buŝo  
 13 **Dum la simpozio pri la Esp-movado de Ĉinio**  
 35 **Esperanto en la okuloj de emerita diplomato**  
 14 Vizito en Shenzhen  
 15 **POR KOMENCANTOJ:**  
 Volo de birdoj  
 12 **ESP-NOVAĴOJ**  
 16 **Servo al fremdlandanoj en Pekino**  
 26 **Lulilo de fervojistoj**  
 49 **ĈINA LITERATURO:**  
 Romanoj de Ming-dinastio (I)  
 El la romano "Tri Regnoj"  
 59 **ĈINAJ ARTOJ:**  
 Floraj kaj birdaj pentraĵoj de Ĉinio (I)  
 34 Nova terapio kontraŭ traŝeito  
 37 **ĈINA MEDICINO:**  
 Ĉinmedicina prevento kaj kuracado de oftaj malsanoj (III)  
 46 **FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:**

## Loĝdomoj havotaj

- 38 Idilia ĝardeno kaj antikvaj konstruaĵoj  
 31 **ALILANDANOJ PRI ĈINIO:**  
 Ĉi tie ĉiu tago komenciĝas en muziko  
 24 Akvomanka krizo  
 32 **KURANTAJ AFEROJ**  
 4 **INTER NI**  
 30 45 **KORESPONDI DEZIRAS**

## SUR LA KOVRILO:

En la komputila centro de la Norda Trafika Universitato

Foto de **HAI FENG**

## INTERNE DE LA KOVRILO:

Nova fizionomio de fiŝhaveno

Foto de **XUE CHAO**

Shenjiamen situas vid-al-vide al Putuo-monto trans maro. Ĝi estas grava fiŝhaveno en Zhoushan-insularo de orienta Zhejiang-provinco. Kiam venas fiŝkapta sezono, tie kolektiĝas multaj ŝipoj. Dank' al la vigla fiŝkaptado la fiŝhaveno ricevas pli kaj pli novan fizionomion.

4 Shibao-turo Foto de **NIU SONGLIN**

11 **ĜENROJ DE NACIMALPLIMULTOJ:**

Patrino kaj filo

Pentraĵo de **XU QIXIONG**

## SUR LA DORSKOVRILO:

[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]

Kampara preĝejo en Norfolk


de **SIMON HEWITT** (Britio)

Vesperigo de Amsterdamo

de **MARIËT HOOGELAND** (Nederlando)

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Wuhan
2. Shenzhen
3. Yangcheng-gubernio
4. Tianjin
5. Yunnan-provinco



# Somera tago en Pekino


Teksto de FENG HUA

Fotoj de SI GONG kaj HAI FENG

En naĝejo



Al laboro



Fiŝhokado



En tetrinkejo





Ĉe sunsubiro

**E**STAS tago meze de junio, 1989, ordinara kaj paca.

Kiel kutime, bicikla torento formis matenan spektaklon de Pekino. Tintado de bicikloj kaj amikaj salutoj regis en la stratoj kaj stratetoj. Mi nerapide biciklis orienten en la bicikla torento.

En promenejoj emeritoj kelkope ekzercas sian korpon per ĉi-

gong kaj tajĝičuan. Sur benkoj en ombro sidas maljunaj geedzoj kaj junuloj lernantaj fremdan lingvon. Kelke da infanoj amuziĝas per balanciloj sub la gardo de infanvartistino.

Antaŭtagmeze mi venis en la magazeton por aĉeti veston. La magazeno famiĝas pro la grandeco kaj abundo da varoj. Mezaĝa virino aĉetante diris al apudstar-

antoj: “Ĉiufoje kiam mi venis al Pekino, multaj konatoj komisiis al mi aĉeti por ili.”


Elirinte el la magazeno, mi venis en la Muzeon de Imperiestra Palaco, kiu distancas nemalproksime. Tie mi vidis sudajn turistojn en modaj vestoj, altaturaj nordanojn en laboristaj uniformoj kaj ankaŭ fremdlandajn turistojn. Ĉe ilia ĉiĉerono mi informiĝis, ke ili estas turistoj el la Federacia Germanio. La ĉiĉerono prezentis min al bela knabino, kaj ŝi flue parolis al mi en la ĉina lingvo, kio mirigis min. “La elegantaj antikvaĵoj multe ĝojigis min. Ĉinoj ofte diras, ke tiu ne estas bravulo, kiu ne atingis la Grandan Muron. Sed mi diras, ke kiu ne vizitis la Imperiestran Palacon, tiu ne rajtas diri, ke li vizitis Pekinon. Nun ni ja venas.” Ĉiuj gajiĝis de ŝia diro.

Vespere mi biciklis hejmen kaj preterpasis bazaron. De tie venis ofertaj krioj kaj bonodoro de rostita ŝafviando. Sub altaj arboj flanke de strato jam venis homoj intencantaj ĝui ripozon en malvarmeta aero... ■




Korpo-ekzercado en mateno





Emeritaj laboristoj

Antaŭ magazeno





Eksterlandaj turistoj en la Imperiestra Palaco




Vendejo de akvomelonoj

## Patrino kaj filo

Pentraĵo de XU QIXIONG

Sur ore flava fono la pentraĵo prezentas taĝikan patrinon kaj ŝian filon. La ĉinaj taĝikoj vivas en la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. Ili okupiĝas ĉefe pri brutobredado kaj ankaŭ pri terkulturo. La virinoj portas robojn kaj broditajn kufojn. La geviroj portas feltajn ŝtrumpojn kaj ledajn botojn. Ili ŝatas laktaĵojn, teon kun lakto kaj precipe viandon.



## ESP-NOVAĴOJ

● Esperanta instrua filmo "Espero", kune farita de la Qingdao-a Asocio de Kultura Interŝanĝo kun Aliaj Landoj, Qingdao-a E-Asocio kaj Qingdao-a Teledistacio, gajnis, aprile de 1989, la unuan premion en la 1-a aljuĝ-kunveno pri la ĉinaj televidaj instruadoj. Ĝi estos prezentata en la koncerna kunveno novembre de 1989 en Japanio.

● La Ĉina Amikeca Eldona Kompanio eldonis februare de 1989 la memoran libron "Memore al Hujucz" verkita de Fei Xiaotong, Xia Yan k.a. En ĝi 5 artikoloj de veteranaj esperantistoj fidele montris liajn elstarajn kontribuojn al la E-movado.

● La Tonghua-a Instruista Instituto de Jilin-provinco prenis Esperanton kiel nedevigan studobjekton. Pli ol 300 studentoj lernas en malsamaj kursoj unu jaron, po 2 h. ĉiusemajne. La kursojn gvidas s-ro Yu Dequan kaj brita s-ro Richard Howard.

● La kurso pri Esperanta fonetiko estas funkciigita de la Kantona Teledistacio de marto, 1989. Ĉar ĝi multe interesis la aŭskultantojn, oni refoje elsendas ĝin de la 3-a de majo. La elsendo daŭros 2 jarojn, 4-foje ĉiusemajne po 20 minutoj. La Guangdong-a Popola Radiostacio nun funkciigas elementan E-kurson.

● La Poradolta Instituto sub la Pekina Scienca-Teknika Universitato funkciigas duon-jaran korespondan E-kurson. Ĝi ekfunkciis la 1-an de julio.

● La Hefei-a Fremdlingva Lernejo de Anhui-provinco funkciigas la korespondan E-kurson, kiu varbas lernantojn tutjare. Ĝiaj diplomitoj estos elementnivelaĵoj en nia lingvo.

● La Porknaba Korespondan E-kurso kune funkciigata de la Chongqing-a Junulara E-lernejo kaj la Junpionira Ĵurnalo de

Sichuan-provinco interesis geknabojn kaj iliajn gepatrojn. Por helpi sian infanon en la lernado, ankaŭ multaj gepatroj lernas en la kurso.

La Linhai-a Geknaba Palaco de Zhejiang-provinco organizis porinfanan E-kurson, en kiu lernas 25 infanoj.

● La 1-an de majo, en Haikou, la ĉefurbo de Hainan-provinco, la



Esperantaj insignoj kaj glumarkoj

Hainan-a E-Asocio okazigis sian unuan laborkunvenon, kiun ĉeestis 18 esperantistoj el la tuta provinco. En la kunveno oni diskutis pri la laborplano en 1989. Nun 27 ĉinaj provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj jam havas sian E-Asocieton.

● Sub la aŭspicioj de la Brazila Spiritisma Federacio, okazos en Brazilio, la ĉefurbo de Brazilo, de la 1-a ĝis la 5-a de oktobro 1989, Internacia Spiritisma Kongreso, kiu kunvenigos spiritistojn el ĉiuj mondpartoj por pritraktado de plej gravaj temoj de la Doktrino de la Spiritoj.

Esperanto kaj Esperantismo estos grava ero de la kongresa programo, ĉar krom prelegoj pri la lingvo kaj ties idealo, rapida kurso,

konstanta ekspozicio kaj disdonado de E-informiloj, Esperanto ankaŭ funkcios kiel labora lingvo, inkluzive por simultana tradukado, apud la angla, la franca kaj la hispana."

● Lastatempe Tokia Esperanto-Kooperativo (TEK) reeldonis la tramonde ŝatatan insignon kaj glumarkfoliojn "Mi Amas Esperanton", kiun TEK eldonis en 1984 en aparta kunlaboro kun JEI kiel memordonaĵo al ĉinaj esperantistoj okaze de la vizito de 5 junaj japanaj esperantistoj kiel parto de la 3000 japanaj gejunuloj invititaj de la ĉina registaro.

● S-ro Yosimi Umeda, vicprezidanto de UEA, invitis viziti Ŝanhajon inter la 20-a kaj 25-a de junio kaj interparolis respektive kun la Ŝanhaja Universitato de Studoj pri Internaciaj Aferoj, la Ŝanhaja Federacio de Sociaj Sciencoj kaj la Ŝanhaja Esperanto-Asocio pri la projekto starigi Azian Edukejon de UEA en la nomita universitato.

Posttagmeze de la 22-a de junio s-ro Xie Lijuan, vicurbestrino de Ŝanhajo, intervidiĝis kun s-ro Yosimi Umeda kaj esprimis bonvenigon kaj dankon, ke li laŭplane venis al Ŝanhajo. Ŝi diris, ke la Ŝanhaja Magistrato subtenas la projekton de UEA kaj ke la edukado certe celos la disvastigon kaj evoluon de Esperanto en Azio. Ŝi petis s-ro Yosimi Umeda transformi al la esperantistoj en Japanio kaj aliaj landoj, ke la situacio de Ĉinio kaj Ŝanhajo estas stabila kaj la politikoj de Ĉinio pri reformo kaj pordomalfermo ne ŝanĝiĝos. Ŝi esperis, ke s-ro Yosimi Umeda konigos al ili, kion li propraokule vidis en Ŝanhajo.

S-ro Yosimi Umeda kore dankis la vicurbestrinon pro ŝia akcepto kaj la subteno de la Ŝanhaja Magistrato al la projekto de UEA. Li diris, ke li ĝoje vidis la bonan ordon de la socia vivo en Ŝanhajo kaj kredis, ke la politikoj de Ĉinio pri reformo kaj pordomalfermo ne ŝanĝiĝos. Li esprimis deziron daŭre klopodi por evoluigi la Esperantomovadon en Azio, inkluzive de Ĉinio.

# Dum la simpozio pri la Esp-movado de Ĉinio

**D**E la 12-a ĝis la 15-a de majo 1989, en Wuhan, la ĉefurbo de Hubei-provinco, la Wuhan-a Esperanto-Asocio okazigis la simpozion pri la evoluo de Esperanto-movado en Ĉinio. Tia simpozio neniam okazis en la ĉina Esp-movado, tial ĝi vekis grandan atenton de Esp-organizaĵoj tra la lando. Pli ol 80 esperantistoj kaj delegitoj de Esp-asocioj de 18 provincoj kaj municipoj partoprenis en la simpozio.

La partoprenantoj varme diskutis pri la ĉefa temo de la simpozio. Eĉ en la ferma kunveno multe da esperantistoj faris aldonan parolon. La varma diskutado donis al mi fortan impreson.

Antaŭ ĉio la partoprenantoj interŝanĝis opiniojn pri la aktuala situacio de la Esp-movado de Ĉinio. Kvankam ili havas malsamajn opiniojn pri la situacio, tamen ili havas plenan fidon al la perspektivo de la movado. Nemalmultaj diris, ke tradiciaj agmanieroj de la movado devas esti reformataj kaj oni ne devas ekskluzive funkciigi Esp-kurson kaj fari Esp-kunvenadon. Ili ĉiuj proponis doni sufiĉe grandan atenton al la apliko kaj propagando de Esperanto en praktiko. Laŭ ili, Esperanto estos agnoskita kaj subtenata de la socio kaj registaro kaj Esp-movado disvolviĝos pluen, nur tiam, kiam ĝi vere servos al la ĉina politiko de reformo kaj pordomalfermo.

En tiu flanko kelkaj lokaj Esp-asocioj faris bonan provon kaj atingis certagradan sukceson. Ekz., en la lastaj jaroj radio-disaŭdigo, sonbendo kaj videobendo estis uzataj kiel gravaj rimedoj por fari Esperantan instruadon. La instruado de Esperanto per TV jam komenciĝis en Shenyang kaj Qingdao (Ĉingdaŭ), kio donis grandan influon al la Esp-instruado en Ĉinio, precipe al tiu en

foraj kaj landlimaj regionoj.

Kunlaborante kun turisma organizaĵo, la Shenyang-a Esp-Asocio servas al turismo per Esperanto. En aŭgusto de la kuranta jaro ĝi jam akceptis vizitgrupojn de esperantistoj el Japanio kaj Sudkoreio. La asocio detale prezentis al alilandaj esperantistoj tri itinerojn en Ĉinio kaj atingis interkonsenton post interkonsiliĝo kun s-ro Yosimi Umeda, vicprezidanto de UEA, ke li respondecu pri organizado de vizitgrupo kaj la Shenyang-a Esp-Asocio pri akceptado. Krome, la asocio ankaŭ pretas okazigi internacian Esperantan konferencon.

La Esp-Asocio de la urbo Weihui, Henan-provinco, faras eksteran komercon per Esperanto kaj eksportas al Japanio produktaĵojn el marmoro kaj artefaritaj pelto kaj lano. Ĝi planas inviti japanajn komercistojn al Henan-provinco. La estro de la asocio Song Wenqun estas kirurgo kaj vicedro de loka hospitalo. Li invitis usonan esperantiston kaj fakulon pri kirurgio al la hospitalo fari prelegon kaj kuraci ezofagan kanceron, kiu ofte suferigas lokanojn. Vidinte ĉion ĉi, multe da statoficistoj, kuracistoj, fabrikestroj sin anoncis por lerni Esperanton kaj aliĝi al la asocio. Ĉi-rilate ankaŭ la Xi'an-a Esp-Asocio gajnis certagradan sukceson.

Per Esperanto fari akademian interŝanĝon kun alilandaj fakuloj pri medicino, kibernetiko kaj komputado estas ĉefa laboro de la Ŝanhaja Esp-Asocio de la lastaj jaroj. Kuracisto Cui Zhijun kontribuis per dekkelkaj Esperantaj disertaĵoj al la "Medicina Internacia Revuo". Pro tio la Universala Medicina Esp-Asocio premiis lin lastjare. Kaj dank' al tio, sukcesis la interŝanĝo inter la Ŝanhaja Medicinista Asocio kaj la

Medicinista Sekcio de Pola Esp-Asocio.

La faktoj montras, ke Esperanto povas servi al la reformado kaj pordomalfermo de Ĉinio, kio multe kuraciĝis ĉiujn partoprenantojn de la simpozio.

Profesoro Chen Wenxi de Shanxi-provinco argumentis, ke en la nuna informada epoko la informotraktado per komputilo influas ĉiujn fakojn senescepte. Nun Usono havas la plej grandan informotenejon de la mondo kaj la angla lingvo havas avantaĝon super ĉiuj aliaj lingvoj. Tamen estas multe da malfaciloj por trakti informojn per la angla lingvo. La nuna inteligenta roboto atingas la saĝon de nur trijara infano, dum Esperanto havas ian avantaĝon en tiu kampo, dank' al sia scienceco. En la informada epoko ĉiuj niaj movadanoj devas tuj ekagi por tio, alie post dek aŭ dudek jaroj Esperanto estos tute ekskluzivita de la angla lingvo. La partoprenantoj opinias, ke oni povas preni informotraktadon per komputilo kiel la unuan paŝon por apliki Esperanton en scienco kaj tekniko. Ĉinio havas aron da esperantistoj sin okupantaj pri komputado. Ankaŭ en aliaj landoj estas sciencistoj, kiuj prenas Esperanton kiel interlingvon de komputila traduko. Por solvi la problemon ni devas fari internacian kunlaboron.

La partoprenantoj diskutis ankaŭ pri la demando kiel altigi la kvaliton de Esperanta instruado. Ili opinias urĝe bezonataj unuigitan planon, alt-nivelajn instruistojn kaj lernolibrojn konvenajn al infanoj, knaboj, plenkreskuloj kaj maljunuloj.

La simpozio ricevis 31 disertaĵojn. Post juĝo 15 el ili estis premiitaj. En la simpozio oni legis parton de la disertaĵoj. ■



Shenzhen

FRANZ JOSEF BRAUN\*  
(FR Germanio):

# Vizito en Shenzhen

— Praktika uzo de Esperanto en komerco

**D**UM komercafera vojaĝo al sudorienta Azio kaj Hongkongo komence de decembro 1988 mi vizitis la faman specialan ekonomian distrikton Shenzhen (Ŝenĝen) en suda P.R. Ĉinio. Akompanis min mia amiko, s-ro Lee Teck Shiu el Hongkongo, kiu antaŭe estis aranĝinta la renkontiĝojn tie.

Per trajno ni veturis de la stacio Kowloon al la finstacio Lo Wu, norde en Hongkongo. Tie tuj post la stacidomo okazis enirformalaĵoj al Shenzhen. Post marŝo super riverponto ni troviĝis en Shenzhen. Atendis nin tie s-ro Du Shouhe, prezidanto de la Shenzhena Esperanto-Asocio kaj inĝeniero ĉe "Disvolva Kompanio por Speciala Ekonomia Distrikto Shenzhen (DKSEDS)". Tuj montriĝis al mi la tute nova urbego Shenzhen kun siaj ĉielskrapuloj, kiu antaŭ dek jaroj ankoraŭ ne ekzistis. S-ro Du gvidis nin piede al la turisma oficejo, kie atendis nin aliaj personoj, inter ili s-ro Liu Weizhuang, membro de la Esperanto-Asocio de Guangzhou, kiu estis veninta al Shenzhen nur por ĉeesti nian kunvenon.

Post iom da tetrinkado kaj enkonduka babilado ni veturis per buseto al la uzino Shenzhen de la "Unua Unuiginta Aŭtomobilfabriko (UUA)". Tie oni produktas kargujojn por ŝargaŭtoj. La direktoro

de la fabriko, s-ro Zhang Mingxian, kaj la sekciestro, s-ro Liu Qin, montris al ni la fabrikejon. Ili havas tie liberan spacon, kaj ni pri diskutis la eblecon, ĉu mia firmao, kiu fabrikas en F.R. Germanio elektrajn aŭtomobilekipaĵojn, povus kunlabori kun UUA. Pritrakti kaj decidi tiun demandon estos afero de la direktoraro de mia kompanio.

Poste ni vizitis fabriketon por sparkbobenoj, kiu estas filio de la Ŝanhaja Uzino por Elektraĵ Aŭtoekipaĵoj. Ankaŭ tie mi sentis la grandegan intereson de la ĉinoj, havigi al si modernan teknikon por plialtigi la efikecon kaj kvaliton de sia produktado. Ĉiu interparolado okazis Esperante-ĉine; kiel interpretantoj rolis s-roj Lee, Du kaj Liu Weizhang.

En la sama vespero s-ro Du aranĝis renkontiĝon kun aliaj esperantistoj de la Shenzhena Esperanto-Asocio. Kompreneble ekestis tre interesa diskutado inter gastigantoj kaj la gasto el malproksima Germanio.

En la posta tago ni vizitis la fabrikon pri ŝtancitaj pecoj, NG SHUN METAL-FABRIKO. Antaŭe tiu fabriko estis en Hongkongo, sed antaŭ kelke da monatoj s-ro Ng translokis ĝin kun la tuta maŝinaro al Shenzhen. Per tio oni povas produkti pli malmultekoste ol

en Hongkongo. Li donas laboron al trideko da personoj. Antaŭ du jaroj mia firmao komencis serie aĉeti de li unu tipon de ŝtancitaj pecoj. Tiu liverado okazas tra la kompanio de s-ro Lee, ESPERO ENTERPRISES en Hongkongo. S-ro Lee ankaŭ helpas por garantii la necesan kvaliton de la liverataj pecoj. Antaŭ nelonge mia kompanio donis al li novan mendon pri seria liverado de alia ŝtancita peco. Okaze de mia vizito en Shenzhen mi konvinkiĝis, ke la ŝtancilo por tio jam ekzistas kaj ke oni baldaŭ povas prezenti la unuajn specimenojn kun atesto pri la kvalitkontrolo. Tio estas necesa por aprobo fare

S-ro Franz Josef Braun (la dua de dekstre) kaj esperantistoj de Shenzhen kaj Guangzhou



de la kliento; ĉar nur post tia aprobo la liveranto rajtas komenci la seriproduktadon.

Ankaŭ en la fabriko de s-ro Ng en Shenzhen ni parolis nur Esperante-ĉine, kaj la tuta korespondado inter ESPERO ENTERPRISES kaj mia firmao okazas en Esperanto. Per tio ni ambaŭ ekzercas la internacian lingvon en niaj komercaj aferoj kaj pruvas, ke tio bone funkcias.

Tre feliĉe mi forlasis Shenzhen. Mi vidis, ke tie per la nova ekonomia politiko de la ĉina registaro ekestis prospera regiono en Ĉinio; mi vidis la novan fabriketon de Ng, kiu ŝtancas la ŝtalpecojn por ni; mi havas ĉe s-ro Lee kaj lia entrepreno ESPERO ENTERPRISES en Hongkongo bonan helpanton kaj peranton; mi konatiĝis kun afabla s-ro Du, kiu atenteme kaj gastame prizorgis min, kaj kun aliaj anoj de la Shenzhena Esperanto-Asocio, al kiu mi deziras plian progreson; kaj fine per kontaktoj kun la sinjoroj de la vizititaj fabrikoj povas ekesti pliaj komercaj rilatoj. ■

\* La aŭtoro estas estro de la aĉetsekcio en uzino de la germana grandentrepreno ROBERT BOSCH GMBH. Krome li estas prezidanto de la Internacia Komercia kaj Ekonomia Fakgrupo, kiu celas al disvastigo de Esperanto en komercio kaj ekonomio.



## POR KOMENCANTOJ

# Volo de birdoj

**B**IRDOJ estas bonaj amikoj de la homoj. Ili havas belan plumaron kaj agrablan voĉon. Ili senĉese kaptas fiinsektojn, gardante la plantojn kaj arbarojn. Sciencistoj diras, ke neniu speco de la birdoj minacas la homojn.

Kiam mi estis infano, mi ofte petis la patron kapti birdon por mi.



Birdo saltadis kaj kriadis en kaĝo, dum mi pensis, ke ĝi kantas pro ĝojo. Sed ofte okazis, ke la birdoj mortis kelkajn tagojn post la kaptiĝo.

Foje mia kaĝo enhavis alian malliberulon. Sed ĝi ne trinkis, ne manĝis nek kriis. Mi demandis la avon, kial malvigligis la birdo, kaj la avo rakontis al mi historion:

Antaŭ mil jaroj en Ĉinio vivis riĉa komercisto. Li tre ŝatis bredi birdojn kaj ĉie en lia domo pendis birdaj kaĝoj. Inter liaj birdoj estis papago, kiu povis ne nur paroli, sed ankaŭ reciti antikvajn versaĵojn. Se venis gasto, ĝi diris "saluton" kaj recitis por la gasto poemeton; kiam la gasto estis adiaŭanta la mastron, ĝi diris "ĝis revido". La komercisto tre amis la papagon kaj

ĉiutage sin amuzis longan tempon per ĝi.

Poste la komercisto estis misakuzita kaj enkarcerigita. Post kelkaj monatoj klariĝis la afero, kaj la komercisto estis liberigita. Reveninte hejmen, anstataŭ respondi al la saluto de la familianoj, li venis al la papago. Plorante li diris al la birdo, kiom forte li sopiris al ĝi. Ekster lia atendo, la papago montris nenian dank-esprimon, sed plendis al li:

"Vi tiom ĉagreniĝis, kvankam vi restis en la malliberejo nur kelkajn monatojn. Sed ĉu vi iam pensis, ke mi vivis mallibere en via kaĝo jam multajn jarojn."

La vortoj de la papago kortuŝis la komerciston. Li komprenis, ke la birdoj volas liberecon same kiel la homoj. Li decidis korekti sian eraron. Kun larmoj en la okuloj li malfermis ĉiujn kaĝojn por liberigi la birdojn. La papago ŝvebis super la mastro, diris "dankon" kaj flugis malproksimen.

Mi klinis la kapon, senparole malfermis la kaĝon, por ke la birdeto revenu al sia patrino. Poste mi neniam petis la patron kapti por mi birdon.

Nun mia fileto jam estas en scivolema kaj petola aĝo. Li petis min kapti por li birdon, kaj mi rakontis al li la historion de mia avo. Mia fileto komprene kapjesis kaj ne plu petas min kapti por li birdon. ■

# Servo al fremdlandanoj en Pekino

Teksto de DA WEI

Fotoj de DA WEI k.a.

**E**N luksa salono de la Pekina Reprezentejo de la Carvax-a Korporacio de Usono, mi konatiĝis kun ĉina junulo. Li nomiĝas Chai Yanqi (Ĉaj Janĉji), la helbrunaj okulvitroj faris lin gracia, post la okulvitroj brilis paro da saĝaj okuloj. Li estas reprezentanto, kies funkcio egalas al vicdirektoreco. Estas interese, ke la ses oficistoj de la reprezentejo ĉiuj estas ĉinoj kaj venis el la Pekina Ĝenerala Kompanio Serva al Alilandaj Entreprenejoj. Ĝin mi vizitis lastatempe.

Tiu ĉi ŝtata kompanio fondiĝis en 1979 kaj servas al la pekinaj agentejoj de alilandaj entreprenejoj. En la pasintaj dek jaroj superis 2 700 la nombro de ĝiaj oficistoj dungitaj de la pekinaj agentejoj de pli ol 600 alilandaj kompanioj kaj firmaoj.

## EN LA KOMERCA PERIODO POST LA FONDIĜO DE LA KOMPANIO

En la lastaj jaroj de la 70-aj jaroj de la kuranta jarcento, Ĉinio malfermis al la mondo sian pordon, kiu fermiĝis dekojn da jaroj. Sekve de tio al Ĉinio venis aro post aro da direktoroj de kompanioj kaj mastroj de firmaoj de aliaj landoj. Por fari investon en Ĉinio ili bezonis laborajn lokojn kaj laborantojn.

Ĝenerala vicdirektoro Liu Zhenghong diris al mi: "En la komenca periodo, kiam Ĉinio praktikis la pordmalferman politikon,

pli ol 90 alilandaj kompanioj fondis sian agentejon en Pekino. Alfronte tiun rapide disvolviĝantan situacion, diversajn malfacilojn renkontis la ĵus fondita Pekina Ĝenerala Kompanio Serva al Alilandaj Entreprenejoj. Unue estis malfacile kontentigi la bezonon de alilandaj komercistoj pri oficistoj. En la pasintaj jaroj, la administra sistemo de Ĉinio pri la laborantoj estis tro rigida, la talentuloj ne povis cirkuli laŭ normalaj kanaloj. En 1980, la ŝtato distribuis al nia kompanio nur unu universitatan diplomiton. Kiel tio povis kontentigi la bezonon de alilandaj komercistoj pri talentuloj? Tiam ni taksis, ke en la komenco la alilandaj komercistoj bezonos kontoristojn, ŝoforojn, sekretariojn kaj guvernistinojn kun klereco ne tre alta. Nia kompanio elekte varbis nombron da gejunuloj kun abiturienta klereco en la socio kaj rekomendis ilin al alilandaj komercistoj. Por radikale solvi la problemon pri laborantoj, unuflanke ni daŭre varbis diversajn fakulojn en la socio kaj aliflanke investis por kulturaj junulojn, komisiante al la Pekina Diplomacia Instituto funkciigi kolegian kurson por kulturaj fakulojn. Dank' al tio ĉiujare ĉ. cent diplomitoj el la kolegiana kurso eniras en la pekinajn agentejojn de alilandaj komercistoj."

Liu daŭrigis: "La dua malfacilo de nia kompanio estis pri loĝdomoj. La alilandaj komercistoj rezidantaj en Pekino ne volis longtempe vivi en hoteloj kaj deziris

havi sian apartamenton kaj oficejan domon, sed nia kompanio ne havis domon por liveri al ili. Ni do sendis laborantojn por trovi domojn kaj fine trovis liberajn ĉambrojn. La Hepingmen-a Restoracio de Rostitaj Anasoj en Pekino posedis nove konstruitan 6-etaĝan domegon, ĝi havis nemalmultajn liberajn ĉambrojn. Post interkonsiligo la restoracio luigis al ni du etaĝojn. Post riparado kaj dekoraĉiado de la ĉambroj ni liveris ilin kiel oficejojn al pekinaj agentejoj de pli ol 10 alilandaj kompanioj."

Tion dirinte, Liu ĝoje konigis al mi, ke en la lastaj jaroj pliboniĝis la kondiĉoj de nia kompanio, ĝi

luj ĉinoj laboras en la agentejo de Mizubiŝi-korporacio en Pekino.





asignis grandan monsumon por konstrui tri etaĝdomojn. Estonte ĝi liveros pli multajn kaj pli bonajn ĉambrojn al la alilandaj komercistoj.

## NE ĈIO POR KOMERCADO

Iun printempan antaŭtagmezon, mi sonigis la pordsonorilon de blanka duetaĝa domo proksime al Qianmen-pordego de Pekino, la pordon malfermis juna japana virino. Malantaŭ ŝi staris mezaĝa viro kun aspekto de klerulo. Li estas ĉina pentristo Li Yuchang vizitota de mi. Kiam mi eniris en la salonon, aromo de ĉina inko frapis mian nazon, mi ekvidis, ke sur la tablo kuŝas paperoj, ĉina inko, penikoj kaj inkofrota ŝtonplato. Laŭ invito de la Pekina Ĝenerala Kompanio Serva al Alilandaj Entreprenoj, li fariĝis tie instruisto de ĉinstila pentrarto por familianoj de oficistoj de japanaj firmaoj. Li konigis al mi, ke tiuj du japanaj sinjorinoj lernas pentradon pro sia intereso kaj por levi la kulturecon. Mi trovis, ke en la pasinta tempo ili jam posedis bazan teknikon de pentrado. La bambuoj imite pentritaj de ili vere elspiras

stilon de tuĉpentraĵoj.

En la lastaj jaroj, tiajn servojn multe faris la kompanio. Laŭ diversaj kulturaj postuloj de alilandaj komercistoj kaj iliaj familianoj, la kompanio fondis apartan instruajn servojn. Ĝi havas profesiajn kaj kumulajn instruistojn por instrui diversajn lingvojn. Ĝi dungis fakulojn de pentrarto, kaligrafio, luktarto,

ĉigongo, danco, muziko, fasono, kuirarto k.a., kiuj donas interesajn lecionojn de pli ol 20 studobjektoj.

## RIGORA ADMINISTRADO ALPORTIS BONAN RENOMON


Liveri diversajn dungitojn al la



Ĉina pentristo instruas pikturon al japanaj sinjorinoj.

## Dum ekskurso





Instruado de la ĉina lingvo al alilanda komercistino

nio al Carvax-a Korporacio. Vidinte lin, la usona direktoro donis al li materialon pri la varoj de ĉiuj fabrikoj de la korporacio kaj diris: "Plenforte vendu tiujn varojn en Ĉinio." Antaŭ tiu tipa komerca maniero de Usono Chai Yanqi sentis grandan premon. Sed li rapide elpensis vendan metodon. Li trovis el telefonlibron probablajn klientojn, bezonantajn tiujn varojn. Poste, laŭ la materialoj, normoj kaj teknikaj trajtoj de la ekipaĵoj li skribis prospekton kaj dissendis ĝiajn kopiojn al la koncernaj entreprenoj de Ĉinio. Dank' al tiu metodo li rapide venigis multajn klientojn.

En la lastaj dek jaroj, per siaj diversaj zorgemaj servoj la Pekina Ĝenerala Kompanio Serva al Alilandaj Entreprenejoj fariĝis nemanĝebla forto en la ekonomiaj kaj komercaj aktivecoj inter Ĉinio kaj aliaj landoj. Alilandaj komercistoj diris, ke la servo de tiu kompanio "ludas pontan rolon en la ekonomiaj kaj komercaj aktivecoj" kaj "donis al ni grandan helpon en pli-grandigo de nia komercado en Ĉinio kaj serĉo de fidindaj kunlaborantoj". ■

pekinaj agentejoj de alilandaj entreprenoj estas la ĉefa tasko de la kompanio. Tial, la labora kvalito de la dungitoj rekte spegulis la administran nivelon de la kompanio. La kompanio ĉiam persistis en rigoraj disciplinaj postuloj al la dungitoj, faris al ili premion kaj punon laŭ ilia laboro kaj malpermesis al ili atenci leĝan intereson de la alilandaj komercistoj en Ĉinio, alie ili estos eksigitaj de la kompanio. La kompanio faris rigoran trejnon al siaj elsendotaj laborantoj, por ke ili amike traktu alilandajn komercistojn, servu al ili ĝentile, pacience, atenteme, ekzakte, ĝustatempe kaj bonefike kaj estu zorgemaj en la laboro. Tial plejparto de la elsenditaj dungitoj de la kompanio povas kontentigi la alilandajn komercistojn, kaj nemalmultaj ricevis fidon de siaj dungantoj pro sia elstara laboro kaj estis taksitaj per gravaj komisioj.

menco de tiu ĉi artikolo, rakontis al mi pri sia travivaĵo: En 1983 li estis postenigita de japana kompa-

Laborantoj de la kompanio kaj alilandaj komercistoj en traktado



Chai Yanqi, menciita en la ko-

# La hodiaŭaj Shu-vojoj (II)


Teksto de WEI LIAO

Fotoj de LIU SIGONG

Interligita tunelo

Foto de MOU ZHAOYUAN

## SKEMA MAPO DE SHU-VOJOJ



Hodiaŭ, kiam Sichuan-Yunnan-a Ŝoseo kaj Chengdu-Kunming-a Fervojo funkcias, la antikva Qingxi-vojo jam fariĝis historia postsigno. Reveninte de Mianyang al Chengdu, ni tuj ekveturis suden per trajno.

### CHENGDU-KUNMING-A FERVOJO

La fervojo komenciĝas de la Okcident-Sichuan-a Ebenajo 500 metrojn super la marnivelo, trairas Shamalada-tunelon 2280 metrojn super la marnivelo kaj finiĝas ĉe la Mez-Yunnan-a Altebenaĵo 1900 metrojn super la marnivelo. Ĝi kun 653 pontoj kaj 427 tuneloj longas entute 1085 km, dum la totala longo de la pontoj kaj tuneloj estas 433.7 km.

La trairejo de la fervojo estas malsimpla en la geologia strukturo pro geologia aktivado. Oni nomas tiun zonan "geologia muzeo". 500 km de la fervojo troviĝas en la

**H**ENGDUAN-MONTARO el paralelaj neĝkovritaj montoj de nordo suden staras inter Sichuan- kaj Yunnan-provincoj kaj malhelpas ilian interkomuniki-

ĝon. En ĉ. 130 a.K. peniga konstruo finfine estigis zigzagan piedvojeton, dank' al kiu la du provincoj povis interkomunikiĝi. Jen la konata Qingxi-vojo.



Sur antikva vojo apud fervojo

Sur kampo apud fervojo





La Chengdu-a Stacidomo



La afinaciejo fondita de Amuzika

tertrema regiono je krevo de 7-9 gradoj. Enketo montras ankaŭ, ke ĉe la fervojo troviĝas 183 rokglitejoj, 500 falontaj rokegoj, 100 terfalejoj, 200 rokamasoj kaj 249 kotrokaj fluejoj, krom eroziitaj bordoj, tordaj montoj, karstoj, rok-fendoj, malutilaj gasoj k.t.p. Ĉio ĉi tio ege malfaciligas la konstruon kaj administradon de la fervojo.

En Xichang mi renkontis konstruinton de la fervojo. En sia larĝa salono li diris: "Mi ne bone memoras, kiomfoje okazis terfaloj. Ja ĉiu tunelo kostis homajn vivojn. Kiam ni fosis Shuanghe-tunelon, subita sablofluego forportis 20 homojn. Oni ne trovis eĉ iliajn korpojn."

Nekompleta statistiko diras, ke mil vivoj perdiĝis en konstruado de la fervojo. Alivorte, ĉiu kilometro de la vojo kostas unu vivon. Se trajno fajfus honore al la martiroj je ĉiu tombo, ĝi devus fajfi de Chengdu ĝis Kunming!

## BATALOJ KONTRAŬ SUPERAKVO

La finkonstruo de Chengdu-Kunming-a Fervojo ne signas finon, sed novan komencon de homa konkero super la naturo.

Natura malamiko de la fervojo estas superakvo. De la ekfunkcio de la fervojo en 1970, 309-foje superakvoj rompis la vojon kaj kaŭzis veturĉeson en 3430 horoj. Plej detrua estis la mond-ŝoka kotroka fluego de la 9-a de julio 1981, kiu faligis Liziyida-pontegon je 126 m. longan kaj je 17 m. altan. Du lokomotivoj kaj kvar pasaĝervagonoj estis forportitaj en Dadu-riveron. En la tragedio mortis 7 kondukto-roj kaj 124 vojaĝantoj.


En batalo kontraŭ la naturo homoj spertas kaj doloron de malsukceso kaj ĝojon de venko. Finkonstruiĝis Wahonggou-akvedukto marte 1987. Du monatojn post tio okazis kotroka fluego. 20000 kubmetroj da kot-rokaĵo estis facile enkontukitaj tra la akvedukto en riveron. Post dek minutoj la trajno n-ro 541 sekure pasis.

Por forigi naturan detruon jam investiĝis 100 milionoj da juanoj post ekfunkcio de la fervojo. De 1988 ĝis 1990 la ŝtata fervoja ministrejo investos 20 milionojn da juanoj ĉiujare.

Malgraŭ la malhelpo fare de la naturaj katastrofoj rapide kreskas varkvanto kaj pasaĝerkvanto. En la unua jaro de funkcio de la fervojo transportkvanto de la varo estis 4.67 milionoj da tunoj, tiu de pasaĝeroj estis 2.32 milionoj, sed en 1988 la transportkvanto de varo jam atingis 15.4 milionojn da tunoj kaj tiu de pasaĝeroj 6.42 milionojn.

Ekonomie la fervojo tiras al si la atenton de 50 gubernioj el 7 subprovincoj en Sichuan-kaj Yunnan-provincoj. Ili kovras 136000 kvadratajn kilometrojn. Tiu zono ne nur liveras abundon da greno kaj ekonomiaj plantoj, sed ankaŭ havas abundon da fero, karbo, kupro, plumbo, zinko kaj fosforo. La fervojo estas, por tiel diri, ekonomia arterio de tiu regiono.







Foire en Ganluo



La nova domo de Amuzika





La satelit-lanĉejo en Xichang  
Foto de **WU SHOUZHANG**



Ligno transportota aliloken  
Foto de **LAI HAILONG**

Sur la Chengdu-Kunming-a Fervojo  
Foto de **MOU ZHAOYUAN**



Ji-aj knabinoj antaŭ fotejo



## PROSPERA GANLUO

Mi preskaŭ neglektis Ganluo. Je ekveturo ni preteratentis tiun lokon, la nordan finon de Liangshan-a Ji-nacia Aŭtonoma Subprovinco. En intervjuo multaj diris al ni, ke en raporto pri Chengdu-Kunming-a Fervojo, Ganluo estas nemankigebla.

Tial ni elvagoniĝis en la stacio Ganluo.

Ganluo vere mirigis nin!

Ĝi estas eta guberniurbo en mallarĝa valo. La ĉirkaŭaj montoj kaj rivero trafluanta la urbon baris ĉiujn enir- kaj elirvojojn. Laŭdire, neniu migranto povis reiri de tie hejmen. Tio temas, kompreneble, pri la tempo, kiam la fervojo ankoraŭ ne atingis tien.

Sur ĝiaj mallarĝaj stratoj iras multaj mode vestitaj virinoj kaj pompe vestitaj viroj. Ilia riĉeco eĉ humiligas min: kvazaŭ mi estus malriĉa montano dum ili riĉaj urbanoj!

Min tre mirigis la tiea rapida industria disvolviĝo. Nur en 1954 Ganluo liberiĝis el sklaveco. Tiam oni terkulturis per fajro kaj tranĉilo kaj la produktofortoj estis tre malaltaj. Tie ne estis fabriko, kaj ekzistis nur tre malmulte da privataj metiistoj. Statistiko montras, ke la industria produktovaloro de Ganluo-gubernio en 1962 estis 53000 juanoj. En 1970, ĝi atingis 1 080 000 juanojn kaj en la pasinta jaro ĝi saltis al 55 480 000 juanoj unuafoje superante la agrikulturan.

Pro kio estis tia ŝanĝiĝo? Ĉiu laŭdas: Sen la fervojo ne estus la hodiaŭo de Ganluo.

La kaŭzoj estas simplaj. Tie rezerviĝas abundo da plumbo, kies grado superas 70%. En la lasta jaro la vendosumo de plumbominaĵo estis 36 800 tunoj, kies valoro estis 28.89 milionoj da juanoj; la produktokvanto de kruda plumbo estis 7 115 tunoj, kies valoro estis 12.94 milionoj da juanoj. Tiuj du sumoj konsistigas grandan parton de la totala industria valoro de la gubernio kaj preskaŭ ĉiuj minproduktaĵoj disportiĝas tra la fervojo.

La reforma kaj pordomalferma politikoj nun praktikataj estas utilaj al la individua kaj kolektiva minekspluatado, kaj akcelas la minekspluaton kaj metalurgion. Tio estas alia kaŭzo de ĝia riĉiĝo.

## RIĈULO AMUZIKA

Mi vizitis la 45-jaran Amuzika, faman ji-an riĉulon en Ganluo.

Antaŭe li estis tre malriĉa. En 1962 en la gubernio eĉ ne estis aŭtovojo. Tiam li dorse alportis ĉiutagajn bezonaĵojn por oficistoj de la distrikta registaro el apuda gubernio 88 kilometrojn fore. Li tage kaj nokte iradis tra densaj herbejoj kaj arbaroj kaj trans toren-taj riveroj. Ĉiu iro-reiro daŭris semajnon. Lia monata enspezo estis ne pli ol 40 juanoj...

Li estas kamparano riĉiĝinta sub la ŝtata politiko de reformo kaj pordomalfermo. Nun li kaj liaj kvar fratoj posedas kvin fabrikojn, kiaj afinaciejo kaj elektrolizejo. Je plena funkcio la kvin fabrikoj produktos 9 000 tunojn da kruda kaj rafinita plumbo ĉiujare. La fratoj

jam havas fiksan kapitalon de 8 milionoj da juanoj.

Oni diris al mi, ke Amuzika ne estas la plej riĉa en la gubernio. Tio surprizis min refoje.

## VOJO AL LA ĈIELO

Estis nokto, kiam ni atingis Xichang, urbon sur altebenaĵo. Aparte brilis steloj sur la ĉielo. Eble pro tio, ke Xichang estas proksima al la ĉielo, oni tie starigis ĉinan satelit-lanĉejon.

La lanĉejo konstruiĝis ekde 1970. Nun ĝi jam fariĝis plenfunkcia lanĉejo kun sistemoj de mezuro, lanĉo, rego, komuniko, meteobservo, k.a. Tie oni ianĉas sinkronajn satelitojn. Tie oni jam sukcese lanĉis 5 komuniksatelitojn. En la unua duonjaro de 1990 tie oni enspacigos 3 satelitojn faritajn de Hughes-korporacio de Usono por Britio kaj Aŭstralio.

Kie antaŭuloj veis, ke la vojo al Shu estas pli peniga ol la vojo al ĉiela, nun konstruiĝis vere vojo kondukanta al la ĉielo. Tio estas vera miraklo! ■

WANG YAN:

# Akvomanka krizo

**E**N la kosmo la terglobo estas rigardata kiel blua sfero, ĉar ĝi estas kovrita de dika akvocirklilo. La totala akvorezervo de la mondo estas ĉ. 1.38-1.4 miliardoj da kubkilometroj. 96.5% de la akvo estas sala marakvo rekte neutiligebla kaj 3.5% estas kontinenta akvo, kies plejparto estas tenata en glaĉeroj, neĝmontoj kaj grundo. La akvo de riveroj, lagoj kaj tiu malprofunde sub la tersurfaco utiligebla de la homaro konsistigas nur 0.35% de la totala kvanto de la dolĉakvo. La akvo en la akvocirklilo ĉirkaŭ la

terglobo formis hermetikan cirkulan sistemon. Pere de la vaporigo, precipitado kaj akvofluo, la marakvo kaj kontinenta akvo atingas cirkulan ekvilibron. La dolĉakvo rekte uzata de la homaro estas la stabila fluakvo el la cirkula ekvilibra precipitaĵo kun totala kvanto de ĉ. 9 000 kubkilometroj. Laŭ la kvanto, ŝajne ne mankas dolĉakvo al la homaro, sed la krizo de la dolĉakva rezervo estas mondskala problemo.

Estas malekvilibra la precipitaĵo de la mondo en tempo kaj loko.

Laŭ statistika analizo al 98 landoj, duono de ili apartenas al akvomankaj kaj duon-akvomankaj landoj kun jara pokapa kvanto de akvorezervo de malpli ol 5 000 kubmetroj. Triono de ili estas akvoriĉaj landoj kun jara pokapa kvanto super 10 000 kubmetroj. Interalie, la unua akvoriĉa lando estas Kanado kun jara pokapa kvanto de akvorezervo de 122 000 kubmetroj. La jara pokapa akvokvanto de Panamo estas 66 000 kubmetroj, sed tiu de la plej akvomanka lando Omano estas nur 540 kubmetroj





kaj tiu de Kenjo 720 kubmetroj. Eĉ en la akvoriĉaj landoj Usono, Aŭstralio kaj Sovetunio, akvomanko okazas en iuj regionoj. Se la jara akvouza kvanto de iu lando atingas aŭ superas trionon de la livereblebla akvokvanto, la akvoeksploatado do atingas la krizan punkton. Nun tia stato jam regas en 19 landoj de la mondo. Precipe en la landoj ĉirkaŭ Saharo kaj en mezorienta regiono la akvoeksploatado atingis la krizan punkton jam antaŭ dekelkaj jaroj.

La ekspansio de loĝantaro kaj la koncentra disvolvigo de urboj certgrade kaŭzas seriozan akvomankon al iuj regionoj. En la komenco de la kuranta jarcento estis 1.6 miliardoj da loĝantoj en la mondo, en la mezo de la kuranta jarcento la nombro de la loĝantaro atingis 2.5 miliardojn kaj en 1987 5 miliardojn. Laŭ takso, en la jaro 2000 la nombro de la monda loĝantaro atingos 6.35 miliardojn, dume la pokapa kvanto de akvorezervo reduktiĝos de 11 800 kubmetroj en 1975 al 7 400 kubmetroj. Nun urbo kun miliono da loĝantoj ĉiutage bezonas minimume 0.5 milionon da kubmetroj da akvo kaj eble bezonos milionon da kubmetroj en la estonteco. La nuna jara kreska elcento de urba porviva akvo multe superas tiun de la industrie kaj agrikulture uzata akvo.

Ankaŭ la rapida disvolvigo de industria kaj agrikultura produktado kaj socia ekonomio kaŭzas akvomankon. Laŭ takso, en la an-

taŭaj 75 jaroj de la kuranta jarcento la jara meznombra kreska elcento de la akvouza kvanto de industrio kaj agrikulturo estis 2.7%, kaj en la jaro 2000 ĝi atingos 2.8%.

Unuflanke, rapide pliiĝas la konsumado de dolĉakvo, aliflanke malpura akvo de urboj estas lasita en riverojn, lagojn kaj akvorezervejojn, kio kaŭzas seriozan polucion al la surtera kaj subtera akvo. Sole la jare drenita industrie kaj urbe eluzita akvo de la mondo atingas 500 kubkilometrojn, kaj en la jaro 2000 ĝi leviĝos al 3 000 kubkilometroj. La malpura akvo ne nur serioze minacas la ekologian medion, sed ankaŭ serioze polucias la utiligeblan akvon. Se oni traktus la malpuran akvon per la metodo dilui 1 porcion da malpura akvo per 10 porcioj da pura akvo, tio preskaŭ konsumus la tutan fluakvan rezervon de la riveroj de la mondo.

Por solvi la akvomankan problemon, diversaj landoj faras sian provadon:

— Konstrui akvoŝpar-tipajn urbojn kaj agrikulturon, reformi irigacian manieron, efektiviĝi aŭtomatan administradon al akvo k.a.

— Levi la cirkule utiligan elcenton de industrie uzita akvo kaj la purigan utiligan elcenton de uzita akvo, enverŝi akvon sub la teron k.a.

— Apliki ekonomian politikon kaj praktiki sistemon de progresiva

pago por kolekti pagon de akvo kaj akvorezervo. Praktiki politikon de alta akvopago en akvomankaj regionoj kaj urboj por bridi la disvolvigon de urbo kaj industrio, multe konsumanta akvon.

— Starigi ŝtatan institucion por kontroli la akvan kvaliton, protekti akvorezervon, publikigi kaj praktiki leĝon por bridi polucion de akva kvalito k.a.

— Eksploati novajn akvofontojn, inkluzive la antaŭe konstruitajn akvorezervojn por rezervi fluakvon. En la lastaj 30-50 jaroj la tuta mondo konstruis pli ol 10 000 grandajn akvorezervejojn kun totala akvorezerva kvanto de pli ol 5 000 kubkilometroj. Nemalmultaj landoj lastatempe esploras rimedojn por sensaligi marakvon kaj preventi akvan vaporigon de sekaj regionoj.

— Reguligi akvon inter diversaj riveroj. En Usono, Sovetunio, Japanio, Hindio, Peruo, Pakistano kaj Ĉinio konstruiĝis grandaj interriveraj akvokondukaj konstruoj.



— Administri akvon laŭleĝe. Almenaŭ triono de la landoj en la mondo publikigis sian akvan leĝon aŭ akvorezervan leĝon. Por solvi internaciajn konfliktojn pri akvo, iuj internaciaj akvorezervaj organizoj faras esploron de internacie direktaj normoj pri distribuo kaj utiligo de riverakvo, kiu fluas tra pluraj landoj. ■

SUN GUOLIANG:

# Lulilo de fervojistoj



Observo de novtipaj fotofibroj



**S**UR Badaling-monto ekster Pekino, bronza statuo staras ĉe Granda Muro. Preterirantoj ĉiuj ĵetas al ĝi estiman rigardon. Antaŭ la statuo kuŝas Pekin-Zhangjiakou-a Fervojo, la unua fervojo projektita kaj konstruita de ĉinoj mem en 1909. La statuo prezentas Zhan Tianyou (Ĝan Tjanjoŭ), faman fervojan fakulon kaj la direktinton de la konstruado de tiu fervojo. Samtempe kun la fervojo naskiĝis ankaŭ lernejo por kulturaj ĉinajn proprajn fervojajn teknikistojn kaj administrantojn — Lernejo de Fervoja Administrado. Ĝi poste fariĝis la nuna Norda Trafika Universitato, kiu situas en la nordokcidento de Pekino.

## NORDA TRAFIKA UNIVERSITATO HODIAŬ

Ĉi-septembre la universitato solenos sian 80-jariĝon. La universitato uzis kelkajn nomojn, kaj en 1970 ĝi reprenis la nunan nomon.

Tiu multifaka altlernejo por alt-rangaj fervojaj teknikistoj kaj administrantoj posedas fakultatojn de industrio, naturscienco, admin-

istrado kaj sociscienco. Same kiel la Ŝanhaja Trafika Universitato kaj la Taiwan-a Nacia Trafika Universitato en Xinzhu, ĝi estas unu el la kvin famaj trafikaj universitatoj de Ĉinio.

Ĝi nun havas 8000 studentojn, inkluzive de 500 esplorstudentoj kaj proksimume 100 alilandaj studentoj. Sub ĝi estas kolegioj respektive por administrado kaj plenkolegioj. Funkcias entute 28 fakoj en 13 fakultatoj, kiel komunika kaj cibernetika inĝenierio, komputiko, transporta administrado, ekonomia administrado, arkitekturo, mekanika inĝenierio, elektra inĝenierio kaj sociaj sciencoj. Funkcias ankaŭ 8 institutoj pri informada scienco, lumonda tekniko, administra scienco k.a. kaj 4 centroj pri komputilo, strukturo, dinamiko kaj transportada ŝajniga provo. 38 esplorgrupoj laboras en la universitato.

Ĝi havas 1200 instruistojn, el kiuj 400 estas profesoroj kaj vic-profesoroj. Ekde 1981, la universitato plifortigas sian instruistaron per doktoroj kaj magistroj. En la lastaj jaroj ĝi establis kunlaboran rilaton en instruado kaj esplorado



En la instrua domo por modeloj de lokomotivoj

Parto de la universitato

La komputila centro de la universitato







Instruisto kaj esplorstudentoj

kun altlernejoj de Usono, Federacia Germanio kaj Japanio, dungis 20 alilandajn profesorojn kiel konsilantojn. Okazis 350 fojoj da prelegoj kaj akademiaj konsultoj fare de alilandaj fakuloj kaj profesoroj.

Sportkunveno de la universitato



Antaŭ la bronza statuo de Zhan Tianyou



En lingva leciono

Krom ordinaraj studentoj kaj esplorstudentoj, la universitato kulturis ankaŭ kolegiajn studentojn kaj alilandajn studentojn. Ĝiaj 5 fakoj rajtas doni doktorecon, kaj ĝiaj 17 fakoj magistrecon. Tiuj fakoj kovras gravajn studteĵojn de la ŝtato kaj tiujn de fervoja administracio. En 1989 ĝi starigis postdoktorecan studocentron, kiu akceptis ankaŭ alilandajn altklasajn studentojn.

En la lastaj jaroj ĝi plenumis sian kutiman instru-reformon kaj samtempe aranĝis instruadon de gravaj kursoj kaj faris takson de instruado kaj juĝon de bonaj kursoj. Novaj reformoj estas praktikitaj en varbo, kulturo, administrado kaj postenigo de studentoj. Fondiĝis funduso por instrua evoluo. Oni faris ampleksan reguladon de laboratorioj, plifortigis administradon kaj instalaĵ-investon de gravaj laboratorioj. Tiuj laboroj iris fruktodone. En 1987, 5 lernolibroj kompilitaj de la universitato estis laŭditaj de la ŝtato. Tiu atingo faris la universitaton la 9-a inter la altlernejoj de la lando. En la lastaj jaroj, studentoj de la universitato gajnis bonajn sukcesojn en konkuraj ekzamenoj de pekinaj altlernejoj pri fiziko kaj fremdlingvoj. En konkura ekzameno de fiziko de pekinaj altlernejoj, 1985, poentaro

de la universitato okupis la unuan lokon, kaj 50% de la premiitoj estis de la universitato. La Scienca kaj Teknika Disvolva Kompanio Huiguang, fondita de esplorstudentoj de la universitato, estas la ununura licenciita studenta negoc-organizo en la altaj lernejoj de Pekino. La kompanio laboras laŭ ŝtata politiko kaj sia celo kun abundo da fruktoj en scienc-tekna disvolvo kaj inform-servo.

## PROPRAJ TRAJTOJ

Jam de ekfunkcio la universitato havis sian propran trajton, t.e. servo ĉefe al la fervoja afero kaj ankaŭ al bezono de la tuta lando. Ĝia ĉefa celo estas kulturi altklasajn teknikistojn kaj administrantojn de fervojo. Elbakitoj de la universitato povas akomodi sin ankaŭ al laboro de trafiko, metalurgio, poŝtado k.a. krom al fervoja afero.

Por adaptiĝi al la reformo kaj malfermiĝo de Ĉinio, la universitato en la lastaj jaroj reformis siajn fakojn kaj evoluigis instruadon de novaj fakoj. Multaj el la nunaj fakoj koncernas al nova teknika revolucio. Tiaj fakoj estas komputiko kaj ĝia apliko, komputila softvaro, informa inĝenierio, ko-

munika inĝenierio, radiokomunikado, trafika signalaro kaj regado, administra inĝenierio de trafiko kaj transporto, transporta ekonomiko, financa kontado, industria administrativa inĝenierio, administra informadiko k.a. Tiuj fakoj havas siajn ĉefrolulojn kaj daŭrigantojn. Ili prenis sur sin gravajn esplorajn taskojn asignitajn de la ŝtato kaj koncernaj departementoj.

Nur en la lastaj 3 jaroj, la universitato komencis 939 esplortemojn, el kiuj 8 estis gravegaj temoj asignitaj de la ŝtato. 8 fruktoj de la esplorado de la universitato gajnis ŝtatajn premiojn. Iuj rezultoj atingis aŭ proksimiĝis al la internacia nivelo. Cetere, 137 traktadoj aperis en internaciaj akademiaj konferencoj.

En 1990 la universitato havos siajn centrojn de instruado kaj esplorado.

## SUKCESA EKSPERIMENTO

Tre sukcesa estas la inform-sistemo por vartrajna manovrado de la norda stacio de Zhengzhou, komputita de profesoroj kaj esplorstudentoj de la komputika fakultato de la Norda Trafika Universitato. En fervoja transporto tradicie oni

manovras varvagonojn permane. Tio kaŭzis, ke varvagonoj restis en la stacio tagojn aŭ eĉ semajnojn. Per tia metodo oni ne povas plej baldaŭ informiĝi, kiam la varvagonoj enstaciĝis, kien ili iros, kaj kion entenas la vagonoj.

La norda stacio de Zhengzhou, kie kruciĝas la Pekin-Kantona kaj Lanzhou-Lianyungang-a Fervojoj, ĉiutage manovras pli ol seponon de la vartrajnoj de la tuta lando. Tio estas la plej granda kvanto en Azio. Plialtigo de rendimento de trajna manovrado estas signifoplena. Se oni ne ŝanĝus la postĝintan metodon de vagona manovrado, oni ne povas mildigi la malstreĉitecon de fervoja transporto. Pro tio la sistemo por la norda stacio de Zhengzhou estis listigita en nacia scienc-teknika esplortemaron. Pere de tiu sistemo oni uzas komputilojn por kolekti, stori, trakti, analizi, indeksi kaj transporti diversajn donitaĵojn, kaj

fine liveras al transportaj administrantaj efikajn informojn. Tiu sistemo estas projektita per modifo de enkondukita Kanada sistemo. La Norda Trafika Universitato, komputika centro de la ŝtata fervoja ministerio kaj sciencistoj kaj teknikistoj de fervoja buroo de Zhengzhou kunlabore elfaris tiun novan sistemon. En modifado pli ol 80% de la programoj estas novaj.

Ekde apliko de la sistemo en majo, 1988, informtrakto en la norda stacio de Zhengzhou plirapidigis. Varvagona manovrado plirapidigis je 35%, kaj ankaŭ la kvalito plialtiĝis, eraroj foriĝis. En la 18-a de novembro tiujare la stacio enlasis kaj ekspedis 24700 vagonojn. Unuafoje rompiĝis la rekordo de 24000 vagonoj ĉiutage.

Tiu sistemo atingis la avangardan nivelon kaj enlande kaj internacie.

## DISĈIPLOJ ĈIE

La universitato jam diplomis preskaŭ 20000 studentojn (2500 post 1949), el kiuj 900 estas esplorstudentoj, 600 studentoj el 22 landoj de Azio, Afriko, Ameriko kaj Eŭropo. Krome ĝiaj korespondaj kaj vesperaj kursoj kulturis 2500 personojn, kaj ĝi funkciigis trejnkursojn por 1200 fervojaj kadroj.

Elbakitoj de la universitato posteniĝis tra la lando en fervoja afero kaj aliaj rondoj; en Ameriko, Afriko, Eŭropo kaj Azio troviĝas piedsignoj de ĝiaj studentoj. Multaj el ili jam fariĝis estroj de altlernejoj, fakuloj en scienc-teknikaj rondoj, konataj profesoroj, ĉefingeneroj en entreprenoj, ĉefkontistoj, ĉefekonomikistoj, gvidantoj de ministerioj kaj provincnivelaĵoj. Ĉiu el la 12 fervojaj burooj tra la lando havas buronivelaĵajn gvidantojn, kiuj diplomigis el la Norda Trafika Universitato. ■

## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo: unu internacia respondokupono por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: unu intern. resp. kup. por spaco de unu linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp-organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.**

\* Nikolaeva e-klubo "Hileja" volonte kunlaboros kun eksterlandaj E-organizoj. Unuavice nin interesas la plej aktualaj problemoj de la homaro. SU-327031, Ukrainio, Nikolaev, p.k. 38, E-Klubo "Hileja".

\* Kvarlingva (a. g. f. E-to) Societo "Ni kaj la Mondo" serĉas partnerojn por kultura, turisma kaj ekonomia kunlaborado. Ĉiuj proponoj estas bonvenigitaj. Novembre la Societo aranĝos tradician internacian ekspozicion de infandeseĝnaĵoj "Planedo estas nia hejmo".

Kontaktu nin kaj petu informojn: USSR 163061 Arĥangelsk, box 125, "Ni kaj la Mondo".

\* Esperanto-klubo en Břeclav preparas en decembro 1989 letervesperon. Kvin lotumotaj salutontoj ricevos premion. Skribu al: Zdenek Hirt, Zapotockeho 4, 690

02 Břeclav, Ĉeĥoslovakio, Respondo garantiata.

\* Geesp-istoj(14-53-j.) dez. kor. tm. pri ĉt., interŝ. bk. kaj pm. Gastigado eblas. Oŭropreta Esperanto-Lerngrupo, Caixa Postal, 42, Oŭropreto, MĜ, BR. 35400, Brazilo.

## ANONCO


Por plioftigi kontaktojn kun niaj legantoj, akceli la aplikadon de Esperanto, plifortigi la interkompreniĝon kaj amikecon inter la ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj kaj antaŭenpuŝi la ĉinan Esperanto-movadon, ni decidis ĉiujare organizi vizitgrupojn de EPĈ-legantoj kaj diverslandaj esperantistoj. Pro tio ni bezonas kunlaboron kaj helpon de esperantistoj en organizado de vizitgrupoj en Eŭropo. Ni kore petas niajn legantojn rekomendi al ni esperantistojn, kiuj laboras en turismaj servoj de okcidenta Eŭropo, kaj esperantistojn kaj Esperanto-organizaĵojn, kiuj havas kunlaborajn rilatojn kun iu turisma servo de okcidenta Eŭropo kaj pretas kunlabori kun ni tiurilate. La adreso estas: El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, CN-100037 Beijing, Ĉinio.

Antaŭdankon pro via atento!

La Red.

# Ĉi tie ĉiu tago komenciĝas en muziko

de JEFFREY STEENO\* (Usono)



La aŭtoro

Ĉi tie ĉiu tago komenciĝas en muziko. Je la sesa kaj kvarono matene, kiel ekflorantaj floroj sur arboj, la muziko de matena gimnastiko ŝvebas super la kolegio. Milo da studentoj en bluaj sportaj vestoj svarmas al la sportejo, multaj el ili eĉ kunportas gamelon. Iliaj kuleroj kaj gameloj interfrapiĝas laŭ la melodio de muziko. Ĉinoj tiel simple kaj tiel harmonie bonvenigas novan tagon. Mi ne komprenas, kiel ili povas ellitiĝi tiel frue. Je tiu tempo mi frotis la ĵus malfermitajn okulojn, haste infuzis glason da kafo kaj cerbumis pri la diferenco inter kelkaj vortoj de la ĉina han-lingvo, kvazaŭ mi troviĝus en ekzamenejo.

En Pekino muziko aŭdiĝas ne nur en lernejoj kaj teatroj, sed ankaŭ dum biciklado sur strato. Ĉie ŝvebas belaj melodioj. Mi ofte pensis, ke se oni volus konstrui alian straton "Broadway", Pekino estus ideala urbo.

Usonanoj denaske estas nehumilaj kaj ĉiam emfazas la memon, sed tie, kie oni devas esti ĝentilaj, ili kondukas ne sufiĉe nature. En Usono, oni opinias, ke por ĉia afero ju pli granda ĝi estas, des pli bona ĝi fariĝas, ili ĉiam rigardas sian konduton prava, sed en Ĉinio la aferoj statas alie.

Oni ofte demandis min: "Ĉu vi scipovas danci?" "Kantu por ni!" "Vi estas altastatura, vi certe scipovas ludi korbopilkon?" "Ĉu vi povas trinki multe da biero?" "Vi estas fortika, iru do kun ni al la lago Bayi por fari vintran naĝon, (la temperaturo estas 4°C)!" Al la supre menciitaj demandoj mi ĉiam ĝoje faris kontentigan respondon: "Jes, ĉion mi povas." Fakte, mi ofte trovis, ke mia kapablo estis multe malpli granda ol tiu de miaj ĉinaj amikoj. Tiam ili demandis min: "Pri kio vi okupiĝis en Usono?" Demando trafa! Pri kio mi okupiĝis en Usono? Kiam mi povis fari la demanditajn aferojn? Ankaŭ mi volas demandi ilin: Kion ĉinoj ne scias fari?

Miaj mankoj ofte montriĝis ankaŭ en lernado de *tajĝičuan* (ĉina korposaniga gimnastiko). Mi pensas, ke mi estis tre komika, kiam mi streĉe faris belajn movojn aŭ svingis lignan spadon. En Usono cirkulas popola diro: Plumo estas pli akra ol spado. Mi volas, ke la afero tiel iru, alie mi montriĝos tro senkapabla.

Mi konsilas al tiuj usonanoj, kiuj intencas vivi mallongtempe en Ĉinio, unue sin ekzerci per kanto kaj korbopilado.

Aliflanke, mi jam sukcese posedas la babilan "arton". Ĉinoj estas babilemaj. Mi ofte uzis multan tempon por babili kun miaj ĉinaj amikoj trinkante bieron. Kvankam ni venis de malsamaj lokoj de la mondo kaj havas malsamajn travivaĵojn, tamen ni babilis en akordo. La homoj ja havas saman koron.

Nia babilado ofte okazis dum biciklado. Sur strato mi estis kvazaŭ unu el orfiŝaro fluanta antaŭen. Estis agrable, ke mi vidiĝas kvazaŭ filma stelo, multaj pasantoj salutis min: "Saluton! Alilan-

dano!" Post la salutvortoj ni ofte komencis varman babilon. Atinginte cellokon, ni adiaŭis unu alian. Baldaŭ mi havis aliajn novajn amikojn.

En Pekino ankaŭ biciklo estis mia amiko, ni komprenis unu la alian. Mi ofte ĝin riparigis, kaj ĝi portis min al la lokoj, kiujn mi volis viziti. Sen ĝi mi povis viziti nenium lokon. Se mi veturas per aŭtobuso, la foj-refoja en-kaj elaŭtiĝo por ŝanĝi veturilojn konsumas mian multan energion, kio egalas al partopreno de piedpilka konkurso.

Kiam mi bicikle trapasis stratojn kaj stratetojn en Pekino, mi ofte estis kortuŝita de la energio de la urbo. Ĉie iras konstruado. Domkonstruadooftiĝas kiel arbo-plantado. Miloj kaj dekmiloj da bicikloj kuras sur stratoj. Mi pensas, ke la magistrato de Pekino devas sinteze utiligi tiun energion, se oni ligus ĉiujn malantaŭajn biciklajn radojn kaj formus generatoron, ĝi povus liveri al la mondo mirindan elektran energion.

Tio estas Pekino de mi vidita.

En mia infaneco mi informiĝis, ke se oni fokus truon sur la tero de Usono, trapasantan la kernon de la terglobo, ni povus atingi Ĉinion tra ĝi. En sennombraj someraj tagoj, ni senĉese fosis truon en la ĝardeno por efektiviĝi la revon atingi la malproksiman misteran Ĉinion.

Nun mi jam estas en Ĉinio, kvankam mi venis ne tra tiu truo. (Mi ne fosis la teron, la polvo en Pekino jam estas sufiĉe densa). Pekino estas tiel ĉarma, kiel en mia sonĝo dum la infaneco. Sur la bela lando vivas amika popolo. ■

\* La verkinto estas usona studento de la Pekina Normala Kolegio.

● Nun oni jam sukcese disvolvis la unuaperiodan konstruadon de Ertan-hidroelektrajo, la plej granda en Ĉinio. La elektrajo, situanta ĉe la malsupra parto de Yalong-rivero en Sichuan-provinco, kun totala projekta generatora kapacito de 3 300 000 kw, ĉiujare produktos 17 miliardojn da kWh da elektro.

● En la kampo de la plej avangardaj biologiaj teknikoj de la mondo, Ĉinio jam sukcesis en esplorado de pli ol 20 branĉoj, i.a. la esplorado de hibrida rizo sin trovas en la antaŭa loko de tiu de la mondo. Nun evoluintaj landoj de la mondo ekspluatas pli ol 80 medikamentojn produktitajn per nov-biologiaj teknikoj, kies plejparton Ĉinio povas ekspluati.

● Ĉinaj esploristoj lastatempe veturis al la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo por tie daŭrigi la sciencon argumenton "konduki akvon de sude norden" en la okcidentlinia akvokonduka konstruado.

Ĉinio planas konduki akvon de Yangzi-rivero en la Flavan Riv-

eron. Tio estas grandioza hidraŭlika konstruado. Ankaŭ ĝiaj orienta kaj meza linioj nun estas en esplorado kaj argumentado.

● De multaj jaroj la centra registaro de Ĉinio per financo, materialoj, teknikistoj kaj teknikoj helpis kaj subtenis Xinjiang en nordokcidenta Ĉinio, pro ĝia malforta ekonomia bazo. Nun la fiksa kapitalo tie investita de la ministerioj de la centra registaro atingis 20 miliardojn da juanoj entute.

● Pan Jixing, esploristo pri naturscienca historio de la Ĉina Akademio de Sciencoj, pruvis antaŭ nelonge per nekontesteblaj atestoj, ke Ĉinio jam havis paperon en la Okcidenta Han-dinastio (206 a. K. - 25 p.K.). La historio de la ĉina paperfarado devas komenciĝi minimume je du jarcentoj pli frue.


● Arkeologoj pri mineralogio kaj metalurgio malkovris ruinon de kupra minejo de la dinastioj Shang kaj la Okcidenta Zhou (ĉ. 16 jc. a. K. - 771 a. K.) en Ruichang-

gubernio, Jiangxi-provinco, ĉe la baseno de Yangzi-rivero. Tiu malkovro antaŭigis la historion de la kupra ekspluatado de Ĉinio je centoj da jaroj kaj havas gravan signifon por esplori la ĉinan bronzan kulturon.

● Ĉinaj sportistoj gajnis ĉiujn orajn medalojn escepte tiun de la miksa parludo en la Sesa Monda Volana Ĉampioneca Konkurso okazigita la 4-an de junio en Ĝakarto.

● Ĉar en Ĉinio la nordorientaj tigroj estas pereontaj, bred-produkta centro de felisedaj bestoj meze de Wanda-montaro en Heilongjiang-provinco enkondukis de eksterlande nombron da nordorientaj generpovaj tigroj. Post du-jara generado nun oni havas 13 tigridojn.

● Peco da primitivaj arbaroj en la Tropika Botanika Ĝardeno de Xishuangbanna sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, en la suda parto de Yunnan-provinco, jam fariĝis "rifugejo" de raraj tropikaj vegeta-



Vicprof. Xu Jingfei (meze) de la Anhui-a Agronomia Instituto estas elstara en esploro pri la genetiko de rizo.



Laboranto de la botanika ĝardeno Xu Zai-fu (maldekstre) observas raran vegetalon.




loj minacataj de pereco.

Xishuangbanna kun pli ol cent sovaĝaj kaj parencaj specoj de kulturataj plantoj estas honorita kiel provizejo de diversspecaj vegetaloj. Ekde 1988 42 vegetaloj protektataj de la ŝtato jam translokiĝis tien.

● Lastatempe estas trovita pitoreskejo, t.e. cigna lago en primitiva stato en Xishui-gubernio, Guizhou-provinco, sudokcidenta Ĉinio. En la pitoreskejo, 11 km longa kaj 16 km larĝa, ĉie vidiĝas apikaj krutaĵoj, kuriozaj montpintoj, gigantaj rokegoj, antikvaj arboj, altaj lianoj, prosperaj arbaroj kaj belaj bambuoj, kaj murmurantaj klaraj rojoj. La flaŭro kovras 95% de la areo de la pitoreskejo. Tie moviĝas sovaĝaj kaproj, moskuloj, ruĝventraj orfazanoj, bambuskoloj (*Bambuscola thoracica thoracica*) k.a. Tie vidiĝas aroj da bluj kaj flavaj simioj.

● En Neixiang-gubernio, Henan-provinco, ĉe la baseno de la Flava Rivero konserviĝas antikva oficejo de gubernia registaro, la ununura plej perfekta en Ĉinio. Tie konserviĝas ne nur kompleta antikva




Tablo en la antikva oficejo en Neixiang

konstruaĵaro, sed ankaŭ pluraj valoraj historiaj objektoj, inter kiuj estas longa tablo uzita antaŭ 659 jaroj.


● Nun oni konstatas, ke la aerolito-kavo en Duolong ĉe la limo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio kaj Hebeiprovinco, norde de Pekino je 200 km, estas la plej granda aerolito-kavo ĝis nun trovita sur la tero. La

diametro de ĝia interna cirklo estas 70 km, dum tiu de ĝia ekstera cirklo 170 km.

● Laŭ la raporto de Ekonomia Ĵurnalo, superproduktado de tabako multe malhelpas la grenproduktadon kaj tiu de brando kaj biero konsumis 25 000 000 tunojn da greno en la lastaj jaroj en Ĉinio, kiuj sufiĉas por miliardo da loĝantoj en manĝado de du monatoj.



Tamburo kaj armiloj en la antikva oficejo



HE JUNZHOU:

## Nova terapio kontraŭ traheito

Chen Yinkui (maldekstre) metas magnetan mikroringon en la korpon de paciento.

**K**ARBMINISTO Yang Jianzhou suferis de astmo kaj tusado dum 7-8 jaroj kaj fariĝis osteca kaj kurbigita. Antaŭe li altis 178 cm, sed nun malpli ol 165 cm. La kuracistoj, kiujn li vizitis, diris, ke lia malsano estas nekuracebla. Liaj familianoj malesperis pri lia resaniĝo.

Por serĉi ian eblon de resaniĝo li, kun 200 juanoj, venis en iun kuracejon de Yangcheng-gubernio Shanxi(Ŝanŝji)-provinco. Iu pli-ol-40-jara kuracisto faris al li sur la brusto malgrandan tranĉvundon kaj metis en ĝin magnetan ringon, dirante, ke li venu por ricevi la duan operacion post 7-taga ripozo. Post la tria operacio lia astmo kaj tusado evidente mildiĝis. Li ĝoje revenis hejmen.

La kuracejo, kie Yang Jianzhou ricevis kuracadon, estas la Centra Kuracejo de Qinchi, Yangcheng-gubernio, la Yangcheng-a Traheita Hospitalo. La kuracisto estas ĝia estro Chen Yinkui, kiu inventis la terapion meti magnetan mikroringon en la korpon por kuraci kronikan bronkiton.

Antaŭ ĉ. mil jaroj la kuracefiko de magnetismo jam estis malko-

vrita. En la antikva ĉina farmakopeo "Ben Cao Gang Mu" legiĝas: "Magnetismo povas forigi akumulitan akvon en la korpo, fortigi la viklecon de la renoj, kuraci kapturnon kaj surdecon, klarigi la vidadon ktp." Alia medicina verko "Ben Cao Bian Du" diras: "Magnetismo povas enlasi aeron kaj mildigi astmon!" En la lastaj dekoj da jaroj, kun la senĉesa disvolviĝo de la moderna scienco, la magneta terapio rapide progresis. Estis provoj de kuracado per magneta terapio en- kaj eksterlande.

Ĉu oni povas uzi tian magnetan funkcion por kuraci traheiton? D-ro Chen Yinkui, diplomiginte el la Changzhi-a Medicina Kolegio de Shanxi en 1976, post plujara esplorado, inventis la terapion, kiu estas benefika, facile praktikebla kaj malmulte suferiga. Ekde 1986 la kuracejo kuracis ĉ. 3500 pacientojn, el ili 98% ricevis bonan efikon kaj 60% resaniĝis.

S-ino Wang Jiping el Hongkong malsaniĝis je traheito antaŭ 4 jaroj. Ĉiufoje, kiam ŝi tuis, ŝi malfacile spiris, eĉ sendormis tutan nokton. Ŝi intencis sin mortigi plurfoje, sed ŝi ne volis forlasi

siajn edzon kaj infanojn. Ŝi vane vizitis la famajn kuracistojn en Hongkong. Iu alilanda kuracisto asertis al ŝi: "Eble vi devus preni medikamenton dum la tuta vivo." Dum longa tempo ŝi glutis multekostajn tablojdojn dufoje ĉiunokte por iomete dormi. Maje de 1987 ŝi venis al la Yangcheng-a Traheita Hospitalo. D-ro Chen persone faris al ŝi operacion. Tiunokte, ŝi unuafoje post la 4 jaroj kviete endormiĝis sen gluti tablojdojn. Post kelkaj tagoj ŝi gaje ekskursis al la pitoreska Yunmeng-monto en Yangcheng, veturinte ĉ. 50 kilometrojn. Kiam ŝi surgrimpis la monton kaj rigardis la ondantan Flavan Riveron en malproksimo, ŝi eksaltis de ĝojo kaj emociiĝis ĝis larmoj.

Nun la famo de la hospitalo disvastiĝas en- kaj eksterlande. Multe da pacientoj de Japanio, FR Germanio, Brazilo, Filipinoj k.a. sendis leterojn al Chen por peti kuracadon. Ankaŭ pacientoj el Hongkong, Aomen kaj Taiwan venis al li unu post alia samcele. Por kuraci pli da pacientoj, la hospitalo starigis siajn filiojn en Pekino, Tianjin kaj Jiangxi-(Ĝjangŝji)-provinco. ■

ZHENG JINJING:

# Esperanto en la okuloj de emerita diplomato

**F**OJE en la kunveno de la societo “Amikoj de Esperanto” mi informiĝis, ke Chai Zemin, vicprezidanto de la Ĉina Popola Instituto de Eksteraj Aferoj kaj honora konsiliano de la Pekina Esperanto-Asocio, lernis Esperanton en la 30-aj jaroj. Pasis 50 jaroj. Kion tiu iama ĉina diplomato nun opinias pri Esperanto? Kun tiu demando mi intervjuis lin.

**Zheng:** Estimata sinjoro, oni diris, ke vi lernis Esperanton antaŭlonge. Ĉu vi povus iom rakonti pri tio?

**Chai:** Mia hejmloko estas Wenxi(Ŭenŝji)-gubernio de Shanxi(Ŝanŝji)-provinco. Diplomiĝinte el mezlernejo, mi eniris en instruistan kolezion. Mi aktive partoprenis en progresiva aktivado de lernantoj. En 1935 mi forlasis la hejmlokon kaj venis en Xi'an, la ĉefurbon de Shaanxi(Ŝenŝji)-provinco. Tiam mi aĝis 18-19 jarojn. Tie mi trovis neniun konaton. Feliĉe, mi sukcese trapasis ekzamenon por lerni medicinon en la tiea milita departemento. Tiutempe esperantisto Jing Meijiu (Ĝing Mejĝiŭ) fondis Esperantan societon en Xi'an. Pere de mia kunlernanto Wei Fengqi (Ŭej Fengĉji) mi konatiĝis kun Jing Meijiu. Poste la societo funkciigis Esperantan kurson, en kiu ni kune lernis. Instruisto Xie (Ŝje) gvidis la kurson kaj la instru-materialo estis kompilita de li mem. Post vespermanĝo ni iris lerni Esperanton. Neatendite, la estro de la milita departemento informiĝis pri tio. Li kunvokis nin: “Medicino povas teni la tutan vivon. Ĉu vi, malriĉaj knaboj, lernas Esperanton por fariĝi diplomatoj?” Ha, lia parolo por mi fariĝis fakto.

Tio estas la unua fojo por mi kontaktiĝi kun Esperanto. Poste la kondiĉoj estis malfavoraj, ke mi ne povis persisti en la lernado.

**Zheng:** Ĉu vi memoras personojn, kiuj tiutempe lernis Esperanton kune kun vi, kaj viajn aktivadojn?

**Chai:** Iu nomata He Ying alinomiĝis poste. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio li funkciis kiel vicurbestro de Shenyang kaj poste fariĝis ĉefprokuroro de la prokuroro de Shaanxi-provinco. Kaj alia nomiĝas Li Jinzhang (Li Ĝingang), kiu nun estas rektoro de la Xi'an-a Instruista Universitato.

Tiam ni lernis kaj propagandis Esperanton kaj ne

forgesis partopreni en la ŝtorma movado de studentoj. Ĉiudimanĉe ni iris al progresema librejo por legi librojn, gazetojn kaj ĵurnalojn. Ni uzis la duonmonatan gazeton “Elirejo” fonditan de Jing Meijiu kiel propagandilon kontraŭ la japana agreso kaj samtempe propagandis Esperanton kaj reformadon de la ĉina skriba lingvo. En 1936 ni aperigis felietonon “Nia Lingvo” en “Industria kaj Komerca Ĵurnalo” unu fojon ĉiusemajne. Nia ĉefa celo estis daŭre propagandi Esperanton kaj reformadon de la ĉina skriba lingvo. Ni eldonis sume 12-13 felietonojn. Poste ni fondis la gazeton “Revivigo”. Ĉar ni propagandis Esperanton kaj progreseman penson, tial ĝi estis malpermesita post apero de nur du numeroj.

Pro tio mi estis enkarcerigita. Du artikoloj verkita de mi estis forprenitaj. Kvankam ili estis anonimaj, tamen oni suspektis min, ligis min per piedkatenoj 4 kg. pezaj kaj metis min en militan juĝejon. Oni pridemandis min: “Kial vi lernas Esperanton?” Mi respondis: “Mi studas medicinon. Esperanto estas kreita de okulkuracisto Zamenhof. Mi volas legi originalajn medicinajn verkojn pere de Esperanto.” Oni eltordis nenion kaj fine liberigis min, opiniante min juna kaj sencia. Post la liberigo mi daŭre partoprenis la Esperanto-movadon. Tiutempe estis la 50-a datreveno de la naskiĝo de Esperanto. Ni elton-

Chai Zemin (maldekstre) kaj laboranto de la Pekina Esperanto-Asocio





Chai Zemin (la tria de dekstre) en la kunveno de la societo "Amikoj de Esperanto"

dis portreton de Zamenhof el la gazeto "La Mondo" eldonita en Ŝanhajo por kupra plato kaj eldonis specialan numeron por celebri la 50-jaran jubileon de Esperanto. Por sukcesigi la aferon, mi petis Jing Meijiu verki du artikolojn kaj mi mem skribis du artikolojn. Kaj ni publikigis ilin plene sur unu paĝo. Tio estis nia lasta felietono "Nia Lingvo". Poste mi forlasis Xi'an kaj servis en armeo, tial mi ne povis plu kontaktiĝi kun Esperanto.

**Zheng:** Pasis jam duonjarcento, tamen vi ankoraŭ tiel fervoras por Esperanto...

**Chai:** Kvankam mi lernis Esperanton interrompe, tamen mi ĉiam amas ĝin. Post kiam mi venis en Pekinon, mi hazarde ricevis du lernolibrojn de Esperanto. Mi estis tre ĝoja pro tio. Poste mi legis en ĵurnalo, ke la Esperanto-movado ankoraŭ daŭras, kaj pensis, kial mi, esperantisto, staras apude? Sekve mi skribis al la Ĉina Esperanto-Ligo kaj sukcesis denove kontaktiĝi kun Esperanto.

**Zheng:** Estimata sinjoro, mi scias, ke vi longe okupiĝis pri diplomatio. Ĉu vi povus diri vian opinion pri Esperanto laŭ via diplomatia praktiko?

**Chai:** Nun en la mondo ankoraŭ ne troviĝas komuna lingvo, kio malfaciligas la internacian kontaktiĝon kaj embarasas precipe la diplomatojn. Mi iam laboris en Hungario, Gvineo, Egiptio kaj Tajlando, poste funkciis kiel ambasadoro en Usono kaj vizitis multajn aliajn landojn. Eĉ por lingva talentulo estas malfacile lerni la lingvojn de ĉiuj vizitataj landoj. Kiel bone estas, se oni havos komunan lingvon! Tial Esperanto estas tre necesa. Nun multaj personoj ne konas Esperanton kaj lernas la anglan lingvon kiel internacian komunan lingvon. Sed lerni la anglan lingvon estas tre malfacile. Ĝia prononco estas neregula, por ne paroli pri ĝia gramatiko. Mi eklernis la anglan lingvon en elementa lernejo, sed nun ankoraŭ ne posedas ĝin. Rilate la francan lingvon, ĝi havas ordinarajn literojn, tamen ĝia gramatiko estas

komplika kaj malfacile lernebla. Se oni lernas Esperanton, post nelonge oni posedos ĝin. Tio faciligos la internacian kontakton. En Xi'an mi legis korespondaĵon pri Sovetunio skribitan de japana samideano Akita Ujaku en Esperanto. Kaj la artikolon "Unu Semajno en Moskvo" verkitan de ĉina samideano Hujucz mi legis en mezlernejo. Li vojaĝis per Esperanto. Tio montras, ke Esperanto povas komuniki pensojn de homoj.

**Zheng:** Nun multaj personoj lernas Esperanton ĝuste por preni ĝin kiel internacian helpan lingvon.

**Chai:** Jes. Mi opinias, ke ne nur en diplomatio, sed ankaŭ en ordinara internacia aktivado kaj kultura interŝanĝo oni povas uzi Esperanton. En la 30-aj jaroj la Esperanto-movado en Ĉinio kaj multaj landoj de Orienta Eŭropo tre viglis kaj multaj personoj vojaĝis per kaj korespondis en Esperanto. Se la tiama fervoro daŭrus ĝis nun, la disvastiĝo de Esperanto estus rimarkinda. Bedaŭrinde, pro milito la movado malvigliĝis.

**Zheng:** En diplomatio multaj ne donis atenton al Esperanto. Kial?

**Chai:** Laŭ mi, ili ne bone konas Esperanton nek posedas ĝin. Esperanto, kiel artefarita lingvo sen nacia bazo, havas sian limigitecon, tial ĝi ne estis bone popularigita. Tamen kiel simpla kaj facile lernebla internacia helpa lingvo ĝi devas esti konigita al pli multaj personoj. Ĝin koninte, oni povas ĝin lerni. Dum lernado oni iom post iom interesiĝas pri ĝi. Ĉiufoje, kiam mi ekvidas verdan stelon, mi tuj emociiĝas. La verda koloro simbolas vivon kaj pacon. Antaŭe speciala numero de nia gazeto prenis verdan stelon kiel signon kaj ĝia titolo estis presita en verda koloro. Nun la paca movado en la mondo bone disvolviĝas. Esperanto povas esti kombinita kun la paca movado. Tial Esperanto estas populariginda kaj ni devas bone ĝin propagandi. ■

# Ĉinmedicina prevento kaj kuracado de oftaj malsanoj (III)

de DAI WEN

## SUNFRAPO (VARMFRAPO)

La malsano kaŭziĝas de longa forta sunumado aŭ laboro en alta temperaturo. Feblaj, maljunaj homoj kaj infanoj facile suferas de la malsano.

En la frua periodo de la malsano la suferanto sentas kapdoloron, kapturnon, naŭzon, lacon kaj malklaran vidon, vomas kaj ŝvitas. Kaj pli poste, li febras forte, spiras kaj pulsas rapide, la vizaĝo ruĝiĝas kaj la ŝvitado fermiĝas, sentas la bruston sufoka, menson neklara kaj eĉ svenas. Kelkiam li ŝvitegas senĉese kaj sentas doloron tutkorpe, la vizaĝo paliĝas kaj la membroj konvulsias.

En la unua helpo al la sunfrapa suferanto, oni devas unue porti lin al loko aeruma kaj malvarmeta, malbutoni la veston kaj malligi la pantalonan zonon, poste meti malvarman malsekan tualettukon sur lian frunton kaj masaĝi al li la membrojn. Oni ankaŭ povas trinki al li malvarman teon aŭ bolintan akvon iom salitan.

Estas skrapa metodo ofte uzata de popoloj por kuraci sunfrapon: Oni skrapas malforte la dorson ambaŭflanke de la vertebraro, gorgon, kubutajn kaj genuajn kavojn de supre malsupren per malakra malmola objekto, kia kulereto, trempita en akvo, ĝis vidiĝas purpuraj makuloj sur la haŭto.

Sunfrapo estas kuracebla ankaŭ per masaĝo aŭ akupunkturo. Por kuraci seriozan suferanton oni povas forte masaĝi al li la akupunkturajn punktojn Hegu, Nejĝuan kaj Ĵengong. Por kuraci svenanton oni povas piki al li la akupunkturajn punktojn Ĵengong, Ĉjuĉi kaj Jongĉjŭan.

## STOMAKA DOLORO

Laŭ la tradicia ĉina medicino, troa sato, malsato aŭ preno de kruda kaj malvarma manĝaĵo vundas stomakon. Ĉagreno kaj kolero malhelpas la cirkuladon de vitala energio kaj sango. Ĉio ĉi povas kaŭzi stomakan doloron.

Laŭ malsamaj faktoroj kaj naturoj de stomaka doloro, ĉinmedicinistoj kuracas ĝin malsame, surbaze de kompleta konado pri la malsano.

A. Stomaka doloro pro malvarmo: Ĝenerale ĝi kaŭziĝas de malvarmumo aŭ preno de kruda kaj malvarma manĝaĵo. La suferanto sentas ventroŝveladon, timas malvarmon, estas vomema kaj ne soifa. Meti varmakvan sakon sur la supran ventron povas mildigi la doloron. Por kuraci la malsanon, oni povas engluti pulvoron de bakita klematida radiko per varmeta bolinta akvo, po 5 gramojn, trifoje ĉiutage.

B. Stomaka doloro pro varmo: La suferanto estas drinkema kaj


ŝatas pikan manĝaĵon. Dum la stomaka doloro li sentas varmon je la supra ventro kaj ofte soifas. Por kuraci la malsanon oni povas dekokti 3 g. da koptido, 5 g. da penelio (*Penellia ternafa*), 10 g. da meliaj fruktoj (*Meliae toosendan*), 15 g. da frukta ŝelo de trikosanto (*Trichosanthis*) kaj 3 g. da koridala radiko (*Corydalis bulbosa*) kaj trinkigi al la suferanto dekoktaĵon, dufoje ĉiutage.

C. Doloro pro stomaka gaso: La suferanto ofte sentas gasan ŝveladon en la stomako, ruktas kaj furzas. Por kuraci la malsanon oni povas dekokti 6 g. da seka frukto de citrono, 5 g. da perilaj folioj kaj 10 g. da cipera radiko (*Cyperus rotundus*) kaj trinkigi al la suferanto la dekoktaĵon, dufoje ĉiutage.

Ĉ. Stomaka doloro pro kongesto: Ĝi kaŭziĝas plejofte de kongesto. La suferanto sentas pikan doloron en regulaj tempo kaj loko. Por kuraci la malsanon oni povas englutigi al la suferanto pulvoron de 6 g. da seka fekaĵo de trogoptero (*Trogopterus Xanthipes*) kaj 5 g. da poleno de tifao (*Typha angustata*) per bolinta akvo. Se la paciento suferas stomakan hemoragion, ellasas nigran fekaĵon kaj elvomas sangon, oni povas dekokti 30 g. da brasika radiko kaj 5 lotusradikajn nodojn kaj meti en la dekoktaĵon iometon da poreo suko kaj ĝin trinkigi al la paciento. Kompreneble, oni devas sendi la pacieron de stomaka hemoragio al hospitalo kiel eble plej frue. ■

# Idilia ĝardeno kaj antikvaj konstruaĵoj

Teksto kaj fotoj de LI QIANG




Parto de la Pekina Botanika Ĝardeno

Kuŝa statuo de Ŝakjamunio



La Botanika Ĝardeno en mateno

Foto de HAN HONG



**P**RINTEMPE ĉi-jare, kiam la salikoj svingis la vergojn, la bambuoj abunde kreskis kaj la floroj konkure pompis, ĉe la piedo de la Okcidenta Monto de Pekino prezentiĝis mondo de floroj: rozetaj florprunoj, flavaj forsitioj, buntaj peonioj, blankaj siringoj kaj aroj da prunpersikfloroj... La flora spektaklo altiris sennombrajn ekskursantojn. La persikarboj formis arkadojn, pergolojn, kurtenojn, kaj kovris montetojn. La ekskursantoj plezure ĝuis la belon de la naturo en la persikflora mondo. Tio estis la Unua Persikflora Festivalo en la Pekina Botanika Ĝardeno okazigita laŭ la tradicia moro, ke ĉinoj faras printempan ekskurson en antaŭurbo.



La Pekina Botanika Ĝardeno estas la plej granda ĝardeno de Pekino. Tie kreskas 130000 lignecaj vegetaloj kaj 116 specoj da herbecaj vegetaloj. En ĝia moderna forĉejo lirlas flueto, zigzagas vojetoj ĉirkaŭ rokoj. La vizitantoj povas vidi tie multajn tropikajn vegetalojn.

En la botanika ĝardeno estas ĝardenetoj de peonioj, prunpersikoj, siringoj, magnolioj kaj staŭdoj, kiujn kunligas vojo longa je



Turistoj Foto de HAN HONG

Vojo ombrata de antikvaj cipresoj



mioloj da metroj.

En la ĝardeneto de prunpersikoj kreskas mil prunpersikarboj. En printempo ĉarmas gazonoj kaj la frondaroj de la arboj kovriĝas de floroj ruĝaj, ruĝetaj kaj purpuraj. Kontraŭ la ĝardeneto estas la peonia ĝardeneto plej granda en Pekino. En ĝi kreskas 4000 peonioj de 280 specioj. En majo ĉirkaŭ la statuo de peonia feino buntas peonioj vizitataj de papilioj kaj abeloj. Nelonge post la florado de peonioj, pli ol 200 herbopeconioj de 150 specioj pompas sur rokoj aŭ inter arboj en la peonia ĝardeneto.

Pejzaĝo de alia gusto videblas en la pin-cipresa areo oriente de la ĝardeno. Ĉie en la areo alte staras pinoj kaj cipresoj, kaj aliaj specioj rampas tuj sur la tero. La aero elspiras rezinan odoron, la susurado de branĉoj kaj birdopepado faras la lokon poezia.

La bambua ĝardeneto Jixiu karakteriziĝas per la sudĉinia ĝardenistiko. Meze de la ĝardeno ondetas klara akvo, kaj apud ĝi staras kiosko belvida kaj antikveca. Zigzaga vojeto kondukas ekskursantojn al bambuaroj de pli ol 30 specioj, el kiuj iuj alte staras, aliaj prenas strangan formon kaj triaj havas belajn vejnojn.

Tie kreskas ankaŭ antikvaj metasekvojoj (*Metasequoia glyptostroboides*), cipresoj, ginkoj kaj ekzotaj floroj. Kredeble, ekskursan-



Fosilia arbo

toj multe interesiĝas ankaŭ pri tieaj fosiliaj vegetaloj.

La vojeto kondukas al la ligna arkado. Post la arkado deklivas 150-metra vojo ombrita de miljaraj cipresoj. Ĉe la fino de la vojo etendiĝas ebenaĵo kun impona glazurita arkado. Post ĝi kuŝas la fama antikva templo Shifang Pujue, konstruita en la regperiodo Zhen-guan (627-649) de Tang-dinastio. En la impona templo ĉielskrapas antikvaj arboj kaj estas giganta bronza statuo de kuŝanta Ŝakjamu-

nio, pro tio multe famiĝis la templo kaj ricevis la nomon Templo de Kuŝanta Budho.

En la templo kuŝas arka baseno kaj ambaŭflanke de ĝi estas turoj de tamburo kaj sonorilo. Trans la arkponto estas fronta halo, en kiu staras du argilaj ĉielaj generaloj. Post la halo estas tiu de ĉielaj reĝoj, en kiu kvar argilaj ĉielaj reĝoj majeste gardas ambaŭflanke de Majtrejo. La tria halo estas la plej alta en la templo, kie estas kultataj Ŝakjamunio, Medicinobudho kaj Amitabo. Dorse de ili estas Avalokitesvaro kaj 18 arhatoj.


La lasta halo estas por la kuŝanta budho. Post kurtenoj pendantaj malalte kuŝas bronza statuo de Ŝakjamunio, kiu pezas 54 tunojn, longas 5.3 metrojn kaj altas 1.6 metrojn. Li apogas la kapon sur la dekstra mano, kun la maldekstra brako nature sur la gambo, la piedoj orienten kaj la vizaĝo suden. La statuo farita en 1321 portas puran, modestan kaj solenan stilon de la budhisma arto. Malantaŭ li staras statuoj de liaj 12 disĉiploj aŭskultantaj lian testamenton.

Okcidente de la templo la zigzaga montvojo kondukas en valon, kie ĉarmas floroj, atentoaltiras groteskaj rokoj kaj pepas birdoj. Ĉie en la valo kreskas ĉerizarboj, pro kio la loko estas nomata Ĉeriza Valo.

En la valo lirlas roĝo, kiun akompanas vojeto. Por atingi la fonton de la fluo oni devas trapasi metasekvojaron kaj delikatan ŝtonan ponteton. La longa irado sur la montvojo eble lacigas vin. Volu ripozi ĉe la fonto, lavi al vi la vizaĝon per klara refreŝiga akvo kaj trinki plenbuŝojn da tia akvo kaj la laco forlasos vin tre baldaŭ.

Dank' al la trikilmetra kvietaj Ĉeriza Valo, oni vidas la idilian naturon, forlasinte la bruoplenan urbon. Kia plezuro estas veni en la sinon de la naturo! ■

Glazurita arkado





# Nova disvolviĝo de la ĉina scienco kaj tekniko

Teksto de JIANG WEI kaj ZHAO LIMING

Fotoj de ZHONG JIAN

EN la lastaj jaroj rapide progresis la ĉina scienco kaj tekniko, dank' al la profundigo de la struktura reformo en la scienca kaj teknika kampo, energia akcelo de la kombino de scienco kaj tekniko kun ekonomia konstruado, plifortigo de administrado, ellaboro kaj praktiko de scienc-teknikaj politikoj kaj leĝoj, kaj reguligo de la strategia dispozicio de la scienc-teknika laboro.

## GRANDAJ ATINGOJ

Laŭ nekompleta statistiko, en la lastaj dek jaroj Ĉinio akiris ĉ. 70000 grandajn scienc-teknikajn

atingojn, duoble pli multe ol tiuj en la antaŭaj tridek jaroj. El ili 1561 gajnis ŝtatan inventan premion kaj 1325 gajnis scienc-teknikan progresan premion en 1987 kaj 1988. La ĉefaj atingoj estas jene:

Sukcese lanĉi praktikan disaŭdigan kaj telekomunan sateliton kaj fiksi ĝin ĉe difinita punkto de la orbito. Tio havas gravan signifon por pligrandigi satelitan telekomunan kapaciton, pliigi transmisiajn TV-kanalojn kaj altigi la stabilecon kaj fidindecon de disaŭdigo kaj telekomuniko. Nun la satelito servas per transmisio de la enlanda TV-programo;

Sukcese lanĉi kaj repreni revenigeblan sateliton;

Lanĉi la unuan meteorologian sateliton, kiu prezentas klarajn nubbildojn kun sufiĉe alta distingebleco;

Unuafoje uzi transportan raketon *Changzheng* n-ro 4, kies lanĉejo kaj surtera ekipaĵaro eltenis la provon;

Akiri signifoplenan sukceson en superkonduktiko, t.e., ĉinaj specialistoj elfaris ripete uzeblan superkonduktan materialon kun nulrezistanco en la medio de pli ol 130 K, kiu altigis almenaŭ 5 K kom-

En la regadejo de la satelit-lanĉejo en Xichang





Scienc-esplora ŝipo de Ĉinio

La sun-observa turo de la Pekina Observatorio Foto de JIN ENMEI





pare kun la antaŭa rekordo de la mondo;

Studi pri la mutaciema lokuso de homa kromosomo. Tio havas gravan signifon por preventi heredecajn malsanojn kaj koni patogenajn faktorojn de kancero;

Sukcese fari la ĉefan varminterŝanĝilon de malalttemperatura kaj termodona nuklea reaktoro. Tio markas, ke Ĉinio eniris en la novan kampon de la paca utiligo de atom-energio;

Studi pri Ven-tipo kaj A-tipo el la stamen-sterilaj specioj de tritiko. Tio estas senprecedenta en- kaj eksterlande;

Uzi karbon cindron



Telekomunika satelito farita de Ĉinio


En la laborejo de la komputilo "Lakta Vojo"


grandkvante ĉiujare en talusado por moderna ŝoseo. Tio havas grandajn socian, ekonomian kaj medi-protektan efikojn;

Sukcese koliziigi elektronojn kaj pozitonojn en la Pekina Elektronpozitona Koliziilo. Tio markas, ke la eksperimentado de la altenergia fiziko kaj uzado de sinkronaj radioj de Ĉinio jam atingis altan nivelon internacie;

La malgranda superkomputilo *Taiji 2230* estas elfarita. Ĝi operacias 300 000-foje sekunde kaj havas la funkcion de tia komputilo internacie en la meza kaj posta periodo de la okdekaj jaroj;

La kriolaminatilaro de 2030-tipo





Ĉina sondbalono lanĉota

Foto de LI QIANG

estas elfarita de la Baoshan-a Ŝtala Kompanio kaj multe plibonigita la provizado per kruda materialo al aŭto-industrio, malpeza industrio kaj maŝinfabrika industrio de Ĉinio;

Malkovri la Chengdao-an Petrolkampon kun rezervo de pli ol 100 milionoj da tunoj da bonkvalita petrolo en la ĉina malprofunda maro;

Studo de bazaj teorioj estas antaŭiranto de invento. Post la 30-jara penado Ĉinio jam havas kompletajn fakojn en iuj sciencaj kampoj. La studo pri nombro da

novaj fakoj, kiaj molekula fiziko, surfaca fiziko, surfaca kemio kaj alt-temperatura superkonduktiko, rapide progresas kaj proksimiĝas al la monda nivelo. En 1987 la totala nombro de la esplorataj temoj pri bazaj teorioj superis 20000, je 66% pli multe ol tiu en 1986. La baz-teoria studo de Ĉinio pli kaj pli alte taksigas internacie. 364 ĉinaj sciencistoj havas oficon en mondaj fakaj organizoj, kaj la nombro de iliaj disertaĵoj aperintaj en mondaj gravaj fakaj periodaĵoj leviĝis de la 35-a loko en 1980 al la 24-a, kaj tiu de la disertaĵoj legitaj en internaciaj kunvenoj okupis la 14-an lokon post 1986.

## SCIENCO KAJ TEKNIKO SERVAS AL EKONOMIO

La teknika merkato en Ĉinio grandpaŝe disvolviĝas. Tekniko kiel komercaĵo penetras en ĉiujn ekonomiajn kaj sociajn kampojn per ekspluato, transdono, konsultiĝo, teknika investo kaj laŭkontrakta teknika servo. Laŭ statistiko, en la lastaj kvar jaroj la komerca monsumo akirita per laŭkontrakta traktado en la ĉina teknika merkato kreskis meznombro 60% ĉiujare, kaj en 1987 ĝi jam atingis 3.35 miliardojn da juanoj. En 1988 ĝi atingis 7.2 miliardojn da juanoj, unuoble pli multe ol tiu en 1987. Iuj teknikaj komercaĵoj jam eniris en la internacian merkaton. La organizaĵoj por scienc-teknikaj inter-

ŝanĝo kaj komerco super la subprovinca nivelo estas dense lokitaj. Aperis 10000 scienc-esploraj kombinatoj. La plejparto de la sciencistoj rekte aŭ nerekte servas al la ekonomia konstruado. 360000 sciencistoj faras teknikan laboron aŭ laŭkontraktan teknikan servon en la agrikultura kaj industria produktado. 800000 personoj sin okupas pri teknika ekspluato kaj konsultiĝa servo.

En la lastaj jaroj la centra kaj lokaj registaroj praktikis serion da bonefikaj politikoj por kuraĝigi sciencistojn al la prosperigo de la kampara ekonomio. Samtempe, ili ellaboris aron da planoj, kiaj "Xinghuo" kaj "Fengshou", kun la celo prosperigi la kamparan ekonomion kaj aranĝis kvanton da scienc-teknikaj modelaj entreprenoj, kiuj estas malmulte investitaj, rapide profitodonaj kaj havas grandan influon. Ĝis la fino de 1987, 961 entreprenoj de la plano "Xinghuo" de la ŝtata nivelo kaj 8694 entreprenoj de la provinca kaj subprovinca niveloj jam estis en konstruado. Post kiam ili ĉiuj finplenumiĝos, ili do pliigos produktovaloron je 25 miliardoj da juanoj. Nun 2500 entreprenoj trapasis ekspertizon, ili pliigis produktovaloron je 7.4 miliardoj da juanoj. La proporcio de investo kaj produktovaloro estas 1:5. La plano "Xinghuo" ja estas standardo por akceli la teknikan progreson de la vilaĝaj, mezgrandaj kaj malgrandaj entreprenoj kaj prosperigi la kamparan ekonomion. Ekz., la rimedo rapidigi la kreskon de porko per kompleksa aldonaĵo riĉigis milojn kaj dekmilojn da kamparanaj familioj kaj donis profiton de pli ol 600 milionoj da juanoj.

Por akceli la formiĝon kaj disvolviĝon de altteknikaj kaj novteknikaj entreprenoj, kiuj servas al la enlanda kaj eksterlanda merkatoj, kaj por elkulturi kompetentulojn por la ĉinaj modernaj entreprenoj, Ĉinio ellaboris ankaŭ la planon "Huoju". De aŭgusto 1988, la plejparto de la provincoj kaj urboj de Ĉinio jam efektiviĝis ĝin. Nun

la totala investo por la entreprenoj estas 160 milionoj da juanoj. Oni taksis, ke ili povos doni produktovaloron de 470 milionoj da juanoj jare post sia kompleta plenumiĝo.

Ankaŭ la efektivigo de la alia altteknika plano "863" gajnis iujn atingojn, ekz., en kultivado de novaj rizaj specioj, specialistoj elkultivis dekojn da novaj specioj kun lum-sentiva kerna sterila genaro, kaj tiel oni efektivigis hibridigon de du malsamaj rizaj specioj kaj pliigis rizan produktokvanton je 20%. Sekve, la tekniko de riza hibridigo de Ĉinio restas avangarda en la mondo. Esplorante pri la vida senso de roboto, ĉinaj sciencistoj sukcese reduktis signojn de kolora bildo en la rilatumo de 1:40, kiu estas la plej alta en la mondo.

En 1981-1985, kiam Ĉinio plenumis la Sesan Kvinjaran Planon, 38 gravaj scienc-teknikaj temoj estis enprenitaj en la ŝtatan planon, kaj oni akiris 3896 grandajn atingojn en la kampoj agrikultura,

energia, transporta, materiala, mekanika, elektronika, tekstila kaj manĝaĵa. El ili 3165 atingoj estas uzataj en produktado kaj jam donis rektan ekonomian profiton de 12.7 miliardoj da juanoj. El 76 ŝtataj gravaj scienc-teknikaj temoj, difinitaj en la periodo de la Sepa Kvinjara Plano (1986-1990), iuj donis fruktojn kaj la plejparto plenumiĝas bone. Post la kompleta plenumiĝo ili donos pli grandan ekonomian efikon.

## LAŬLEĜA ADMINISTRADO

En la unua periodo de la okdekaj jaroj la ŝtato komencis elabori teknikajn politikojn pri gravaj kampoj. Nun la ŝtat-nivelaj teknikaj politikoj publikigitaj post la sankcio de la Ŝtata Konsilantaro tuŝas la kampojn energian, transportan, komunikan, agrikulturan, konsumajan, mekanikan, materialan, konstrumaterialan, urbo-konstruan, vilaĝkonstruan, loĝdomkonstruan, mediprotektan,

bioteknikan kaj informadan. En 1988 oni kontrolis la praktikon de pli frue publikigitaj teknikaj politikoj pri 12 kampoj, kaj la rezulto montris, ke pli ol 90% de la politikoj estas en plenumado, kaj triono de ili estis sufiĉe bonefika kaj ludis gravan rolon en la disvolviĝo de scienco, tekniko, ekonomio kaj socio. En la lastaj tri jaroj Ĉinio publikigis dekelkajn gravajn leĝojn, kia la Leĝo de Teknika Kontrakto. Tio akcelis la reformadon en la scienca kaj teknika kampo. Surbaze de tio, Ĉinio ellaboros aliajn leĝojn pri scienc-teknika instituto, scienc-teknika premio kaj atom-energio kaj bazajn leĝojn pri scienco kaj tekniko.

La Patenta Leĝo de Ĉinio, Leĝo de Teknika Kontrakto kaj aliaj bazaj leĝoj, inkl. de administraj leĝoj, donas leĝan kaj politikan garantian al la sana disvolviĝo de teknika merkato, kaj plie, ludos pozitivan rolon en la scienc-teknika progreso kaj disvolviĝo de la nacia ekonomio. ■

## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo: unu internacia respondokupono por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: unu intern. resp. kup. por spaco de unu linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp-organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.**

\* Neijiang-a Esperanto-Asocio kaj ĝiaj geasocianoj dez. kor. kun geesp-istoj kaj organizoj tm. pri diversaj temoj, kaj interŝ. E-eldonaĵojn, pm., pk., fotojn ktp. Adr.: NEA c/o Les Lo, Neijiang Construction Bank, 641000 Neijiang, Ĉinio.

\* S-ro He Zhihui dez. kor. tm. kaj interŝ. pm. Adr.: 1-05# 3 Men, 4 Dong, Dong Gua Shan San Cun, Changsha, Hunan, Ĉinio, 410002.

\* He Jin, 26-j. teknikisto, dez. kor. tm. pri filatelo, fotado, turismo, muziko kaj briĝo, interŝ. librojn kaj gazetojn Esperantajn, angl- kaj ĉinlingvajn, kaj kolektas pm. kaj pk. Adr.: Wuzike, Daqiaoju, Nanyanglu, Zhengzhou, Henan, Ĉinio.

\* Zheng Yusen, 27-j., dez. kor. tm., kolektas filatelaĵojn pri Esperanto kaj interŝ. bk., pm., unuataĝajn kovertojn ktp. Adr.: Jiangti Guandao Shebei Zhizaochang, 110005, Shenyang, Liaoning, Ĉinio.

\* Lu Caiqing dez. kor. tm., kolektas kaj interŝ. neuzitajn pm. Certe respondos. Adr.: Qiche Yingyechu, Jintan Qichezhan, Jintan, Jiangsu, 213200, Ĉinio.

\* Wang Ling, 27-j., dez. kor. tm. pri ĉt., kolektas cigaredujojn kaj interŝ. E-eldonaĵojn. Adr.: Zhejiang Caizheng Yinshuachang, Wen Yi Lu 94, Hangzhou 310012,

Ĉinio.

\* Ma Haibin, 27-j. oficisto, dez. kor. tm. pri diversaj temoj, speciale pri literaturo, poemo kaj lingvoj, kolektas pm. pk. fotojn kaj E-aĵojn. Adr.: Zhengzhou Research Institute of Automation, Zhengzhou, Henan, 450006, Ĉinio.

\* Membroj de E-klubo serĉas kontaktojn kun s-anoj en Japanio, Ĉinio, DK, NL, B, F, Yu, D. Aĝoj: 20-50-j. Ni volonte gastigas Esp-istojn. PEA Esperanto-Klubo 100, PL-67-240 Kotla 168, Pollando.

\* Por kontribui okulfrape al granda kulturliga ekspozicio okaze de la 40-jara jubileo de la ŝtatfondigo ni petas viajn salutojn el ĉiuj anguloj de la mondo. Bonvolu sendi bildkartojn aŭ bele afrankitajn leterojn al: V. Schubert, Schillerstr. 12, Hagenow, DDR-2820. Ĉiu skribinto ricevos jarfine etan memoraĵon pri nia urbeto.

# Loĝdomoj havotaj

Teksto de ZHANG MEIZHI

Fotoj de la Redakcio de "Urbo"

**M**ENCIANTE la troloĝatecon en urboj de Ĉinio, iuj figure komparas ĝin kun ladsardinaĵo. En la ujo, longa je mano kaj

alta je tri cm, pli ol 20 sardinoj estas metitaj unuj sur aliaj. La urboj de Ĉinio tre similas al granda ladskatolo, en kiu svarmas 200

milionoj da "sardinoj". En Ĉinio la malfacilo en loĝado multe superas tiun en veturado kaj provizado per viando kaj vesto. Ĝi estas malfacila problemo ĉiam turmentanta loĝantojn en la urboj.

Tianjin estas unu el la tri municipoj rekte sub la centra registaro de Ĉinio. Ĝi, kiel havenurbo, najbaras al maro oriente kaj estas industria urbo kun longa historio. Nun la tuta lando alfrontas la malfacilon en loĝado, kompreneble Tianjin ne estas escepto. Laboranto de la domadministrejo de Tianjin konigis al mi, ke la malnova Ĉinio restigis al Tianjin loĝdomojn kun plankareo de nur 10.8 milionoj da kvadrataj metroj. La plejparto el la loĝejoj estis malaltaj kabanoj, escepte de vilaotipaj konstruaĵoj en la koncesiitaj lokoj. En 1976 la granda tertremo detruis al Tianjin 70% da loĝejoj kaj miloj kaj dekmiloj da loĝantoj devis loĝi 6-7 jarojn en provizoraj kontraŭtertremaj kabanoj ĉe stratoj kaj stratetoj. En la 70-aj jaroj la meznombra pokapa loĝareo de Tianjin-anoj estis nur 3.7 kvadrataj metroj. Junulo de Heping-distrikto diris al mi, ke lia familio konsistas el 5 membroj. La gepatroj, fratinoj kaj li iam loĝis en ĉambro kun areo de malpli ol 11 kvadrataj metroj. La fratinoj dormis en la subtegmento kaj li dormis en klaplito. Tamen ilia loĝado ne estis la plej malbona en la urbo. En Tianjin ne mankas homoj, kiuj loĝas en tenejoj, koridoroj, subteraj ĉambroj aŭ oficejoj; ofte vi-



Amuzejo por infanoj


deblas, ke la tuta familio de kelkaj generacioj loĝas en unu ĉambro; kaj ĉie estas homoj, kiuj bezonas domon por geedziĝi, ne havas loĝejon eĉ post la geedziĝo aŭ kverelas pro loĝado. La malvasta loĝejo turmentas kaj maltrankviligas la loĝantojn. Ili forte plendas: Kial ne konstrui multe pli da domoj?

Fakte, ekde la Liberiĝo en 1949 la ŝtato asignis pli ol 170 miliar-

dojn da juanoj por konstrui loĝdomojn. Ekde 1978 ĉiujare la ŝtato asignis pli ol 10 miliardojn da juanoj por la sama celo. Ĝis la fino de 1986, la totala plankareo de la loĝdomoj konstruitaj en ĉiuj urboj de la lando en 8 jaroj superis tiun en la antaŭaj 29 jaroj. Ekde 1981 Tianjin ĉiujare konstruis meznombre 3 milionojn da kvadrataj metroj da loĝejoj, ĝis la fino de 1986 ĝi konstruis sume 21



Loĝdomoj en Tianjin



Promenejo

Foto de HUO WENYI

Nova loĝkvartalo

Foto de HUO WENYI



milionojn da kvadrataj metroj da loĝejoj, kiuj egalas la totalan areon de la loĝdomoj konstruitaj en la antaŭaj 31 jaroj. Ekde 1978 multe rapidas la konstruado de loĝejoj en Ĉinio, tamen la problemo ankoraŭ ne povas esti solvita radikale pro la antaŭa "peza ŝuldo".

La troa pliiĝo de loĝantoj estas alia kaŭzo de la malfacilo en loĝado. En la komencaj jaroj post la Liberiĝo junaj geedzoj transloĝiĝis en novajn domojn el du ĉambroj kaj vivis tie komforte. Sed 30 jarojn poste, ili loĝas kune kun siaj gefiloj kaj genepoj ankoraŭ en la samaj domoj. Por iuj familioj la meznombre pokapa loĝareo ne atingas eĉ 1.5 kvadratajn metrojn. Laŭ statistiko de koncernaj departementoj, en 1949 la meznombre pokapa loĝareo de la urbanoj en Ĉinio estis 4.5 kvadrataj metroj, kaj en 1979 tia loĝareo malkreskis al 4.4 kvadrataj metroj. Laŭ la informo donita de Tianjin-a koncerna fako, kvankam Tianjin kon-



Novaj loĝdomoj Foto de HUO WENYI

struas ĉiujare meznombro 3 milionojn da kvadrataj metroj da loĝejoj, tamen kalkulate laŭ la bezono de la nete pliiigitaj loĝantoj pri loĝdomoj, la loĝareo por ili pliiĝas ĉiujare en Tianjin je nur 50000 kvadrataj metroj. Tial, ĝis nun en la urbo ankoraŭ troviĝas 80000 familioj, kies meznombra pokapa loĝareo kalkuliĝas al malpli ol 2.5 kvadrataj metroj. El tio videblas, ke ja ne estas facila afero en 2000 efektiviĝi la celon: La meznombra pokapa loĝareo atingi 9 kvadratajn metrojn.

De la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, la ĉina registaro praktikas malaltlupagan kaj bonstatigan sistemon pri loĝdomo. La sistemo per si mem estas unu el la kaŭzoj pri la malfacilo en loĝado. La rezulto estas, ke la lupago estas terure nesufiĉa por ripari loĝdomojn, kaj ĉiujare la registaro devas elspezi grandan monsumon por ripari kaj administri loĝdomojn. Ju pli multe da loĝdomoj

la ŝtato konstruas, des pli multe ĝi malprofitas. Tio sendube estas granda ŝarĝo por la ŝtato kaj malvigligas la konstruadon kaj luigon de loĝdomoj. Samtempe kun tio, la sistemo neracie pligrandigas la bezonon kaj postulon de loĝdomoj kaj akriĝas la kontraŭdiron inter provizo kaj bezono. Evidentiĝas, ke, unuflanke, al miloj kaj dekmiiloj da homoj mankas loĝdomoj, aliflanke, multaj personoj, kiuj havas loĝejojn, ĉiamaniere klopodas por akiri loĝejojn por siaj gefiloj kaj genepoj. Tial absolute necesas reformi la malnovan sistemon.

Unu el la enhavo de la reformado estas turni la malnovan sistemon, ke la ŝtato elspezas monsumon por konstrui loĝdomojn kaj senpage liveras ilin al loĝantoj, en la novan, ke la ŝtato kaj entreprenoj kolektas monon por konstrui loĝdomojn aŭ la ŝtato elspezas monsumon por la sama celo kaj poste vendas ilin al entreprenoj. Tiamaniere individuoj havas la eblon ricevi loĝdomojn, se la entreprenoj, en kiuj ili laboras, kapablas aĉeti loĝdomojn aŭ elspezi monon por konstrui ilin.

La Tianjin-a Ŝtatejo estas granda fabriko kun 15000 laborantoj. En la lastaj jaroj la fabriko ĉiujare konstruis aŭ aĉetis ĉ. 10000 kvadratajn metrojn da loĝdomoj por laborantoj. Ĉiu el ili havas egalrajton ĝui tiun bonstatigon kaj la distribuo de loĝdomoj estas zorgata de la laborantoj. Ĉiufoje la fabriko elektas personojn por organizi grupon, kiu respondecas pri la distribuo. La grupanoj nepre devas esti justaj kaj prestiĝaj kaj ne havas problemon de loĝado. La kondiĉoj por ricevi loĝdomon estas tre konkretaj. Oni donas poentojn al dompetantoj laŭ iliaj laborjaroj, aĝo, aĝo de gefiloj kaj la nombro de familianoj kaj distribuas domojn laŭ la poentaro. Pri la peto okazas trifoje diskutado. En la unua fojo oni publikigas la

loĝadon kaj poentarojn de la petantoj; en la dua fojo oni publikigas iliajn poentarojn kaj vicojn en la petantaro kontrolitajn de la grupo; kaj en la tria fojo la decido estas farita. Kompreneble, iafoje okazas, ke por gajni pli da poentoj iuj loĝigas ĉe si siajn gepatrojn, kiuj fakte ne loĝas kune kun ili; aliaj longe loĝigas ĉe si siajn edziniĝintajn filinojn. Laboristoj diris, ke ĉiujare la fabriko havas loĝejojn por distribui, tiel ke la supreme menciitaj fenomenoj okazas tre malmulte.

En loĝkvartalo de sudokcidenta parto de Tianjin mi vidis vicon post vico da etaĝdomoj kaj bonordajn florbedojn kaj skulptaĵojn. Lao Xu de la Tianjin-a Ekspluata Kompanio pri Proprieto de Domoj kaj Bienoj diris al mi, ke en la kvartalo troviĝas 200 etaĝdomoj kun plankareo de 800000 kvadrataj metroj. En Tianjin troviĝas 14 tiaj kvartaloj, kiuj ĉiuj estis konstruitaj aŭ konstruataj de la ekspluata kompanio en la periodo de 1980 ĝis nun. 10 el la kvartaloj jam estas konstruitaj kaj 4 konstruataj. Li diris ankaŭ, ke la kompanio fondiĝis en 1981, ĝi estas la plej granda kompanio tiurilate en Tianjin kaj respondecas ĉefe pri ekspluatado kaj konstruado de novaj loĝkvartaloj. En Tianjin funkcias dekoj da grandaj kaj malgrandaj tiaj kompanioj, kiuj respondecas ankaŭ pri riparado kaj malkonstruado de malnovaj domoj, krom ekspluatado kaj konstruado de novaj loĝkvartaloj. Finplenuminte la konstruadon de la 14 kvartaloj, la kompanio konstruos vendeblajn domojn en aliaj lokoj de Tianjin.

En la loĝkvartalo mi vizitis kelkajn loĝantojn. Ili ĉiuj opinias, ke la malfacila problemo pri loĝejo en Tianjin ne povas esti solvita radikale en la proksima estonteco, tamen se vi estos pacienca, vi certe havos loĝdomon. ■



# Romanoj de Ming-dinastio (I)

de MEI ZHI

**L**A literaturo en Ming-dinastio (1368 -1644) akiris plej elstaran sukceson en verkado de romanoj kaj noveloj. En la periodo de la lastaj jaroj de Yuan-dinastio kaj la komencaj jaroj de Ming-dinastio en Ĉinio aperis du eminentaj verkistoj Luo Guanzhong kaj Shi Nai'an. La romanoj "Tri Regnoj" de Luo Guanzhong kaj "Ĉe la Akvorando" de Shi Nai'an estas senmortaj verkoj el la klasikaj romanoj de Ĉinio. De tiam la verkado de romanoj kaj noveloj en Ĉinio eniris en la novan periodon.

Nun oni konas malmulte pri la vivo de Luo Guanzhong. Laŭ koncernaj historiaj materialoj oni rezonis, ke li eble vivis inter 1310-1385. Li, talenta kaj ambicia, estis ankaŭ sperta pri milita kaj politika batalo. Lia verkado ampleksis plurajn literaturajn formojn, tamen li sukcesis ĉefe en verkado de romanoj.

La romano "Tri Regnoj" priskribis la ĉinan historion inter 184 kaj 280 p.K. En la lastaj jaroj de la Orienta Han-dinastio (25-220) eksplodis grandskala kamparana ribelo. Por ĝin subpremi, la politikaj kaj militaj klikoj interne de la feŭda regantaro, senĉese komplotis kaj batalis inter si kaj fine formiĝis la tri grandaj blokoj de Cao Cao, Liu Bei kaj Sun Quan kaj la ĉina historio eniris en la periodon de la Tri Regnoj (220-280). Inter la ĉinoj jam antaŭ longe cirkulis la rakontoj pri la tri regnoj Wei, Shu kaj Wu. Pluraj popolaj verkistoj verkis novelojn kaj teatraĵojn pri la Tri Regnoj. Surbaze de la popolaj rakontoj kaj grandnombraj historiaj materialoj, Luo Guanzhong verkis la romanon "Tri Regnoj". Ĝi, montrante la historiajn aferojn, ne limigis sin per la historiaj faktoj. En la romano iuj personoj kaj intrigoj eĉ ne konformas al la historiaj faktoj. Tial oni diras, ke ĝi estas sep-dekone vera kaj tri-dekone fikcia.

"Tri Regnoj" temas pri historiaj eventoj okazintaj en ĉ. 100 jaroj de la lastaj jaroj de la Orienta Han-dinastio ĝis naskiĝo de la Okcidenta

Jin-dinastio (265-316) kaj priskribas ĉefe la prosperon kaj pereon de la tri regnoj Wei, Shu kaj Wu en duonjarcento. La romano kun 120 ĉapitroj el 750 000 ideografiaĵoj prezentis komplikajn intrigojn pri la militaj, politikaj kaj diplomaciaj bataloj inter la tri regnoj kun Shu-regno kiel la centro. Ĝia strukturo estas grandioza kaj strikta. Ĝiaj priskriboj pri militoj estas tiel brilaj, ke ĉiuj ĝiaj legantoj multe admiras la mirigan talenton de la aŭtoro. En la verko la aŭtoro priskribis multajn kampanjojn grandajn kaj malgrandajn, ĉiun kun apartaj trajtoj. La priskribo pri la fama kampanjo ĉe Chibi estis brila ekzemplo. La aŭtoro priskribis la kampanjon en 8 ĉapitroj, kie sursceniĝis preskaŭ ĉiuj ĉefaj herooj de la verko. Estas ravaj la priskriboj pri la grandiozaj scenoj, zigzagaj intrigoj, strategioj kaj taktikoj de la du armeoj, karakteroj kaj psikaj ŝanĝiĝoj de multnombraj personoj. Antaŭ la kampanjo, Cao Cao aneksis preskaŭ ĉiujn prefektujojn de norda Ĉinio kaj direktis sian lancopinton suden de Yangzi-rivero (loko regata

de Sun Quan). Tiam la armeoj de liaj rivaloj Sun Quan kaj Liu Bei estis en malfavora situacio. La atako de Cao-armeoj estigis akran kontraŭdiron interne de la subuloj de Sun Quan. Ankaŭ Sun Quan estis perpleksa. Poste, alianciĝis Sun Quan kaj Liu Bei por kune rezisti kontraŭ Cao Cao, dume la militistoj de Cao Cao multe laciĝis de longa marŝo kaj ne kutimiĝis al akva batalo. La aliancaj armeoj kaptis tiujn malfortaĵojn de la armeo de Cao Cao kaj aplikis malkonkordigan artifikon por estigi suspekton de Cao Cao al la ĉefoj de siaj akvaj fortoj kaj sekve de tio la trompita Cao Cao mortigis ilin. Zhuge Liang, ĉefa konsilisto de Liu Bei, per mirinda manovro akiris 100 000 sagojn de la armeo de Cao Cao. La akva armeo de Cao Cao malfortiĝis jam antaŭ la batalo. Poste Cao Cao refoje estis trompita de la malamikoj kaj ĉenis siajn batalŝipojn per feraj ringoj. Fine, la armeoj de Sun Quan forbruligis la batalŝipojn de Cao



Portreto de Luo Guanzhong



Portreto de Shi Nai'an

Cao, peze batis liajn armeojn kaj gajnis la venkon.

La romano havis pli ol 400 heroojn kaj atingis brilan sukceson en bildigo de malsamaj herooj, el kiuj ĉiu grava heroo kun klara individueco estis profunde impresa. Ekz., Zhang Fei, brava generalo de Shu-regno, estis heroo malkaŝema kaj kruda. Li malamegis ĉian malbonaĵon. Foje, li tiris lokan koruptigeman oficiston Du You je la hararo, kunligis lin al ĉevalalliga fosto kaj batis lin solide. Li estis brava. Foje li tondre kriis 3-foje sur batakampo, kaj timigis malamikajn generalojn, kiuj defalis de la ĉevaloj. Li iam miskomprenis sian frato-amikon Guan Yu. Li kun rondigitaj okuloj kaj levitaj lipharoj, pikis al Guan Yu per sia lanco, trondre kriante: "Ni batalu ĝis morto!" Per kelkaj vortoj la aŭtoro bildigis vivecan figuron de la impertinenta bravulo Zhang Fei.

Luo Guanzhong montris klaran amon kaj malamon en sia romano. Liu Bei, suvereno de Shu-regno, kaj lia ĉefa helpanto Zhuge Liang sub la plumo de la aŭtoro estis admirataj kiel modelaj saĝa reganto kaj kompetenta kortegano, dum Cao Cao de Wei-regno estis priskribita kiel homo ruza kaj malica, tiel ke Cao Cao fariĝis figuro abomeninda en la okuloj de popolanoj dum longaj jaroj. Zhuge Liang en la romano estis granda saĝulo. Li ĉiam ĝuste antaŭvidis, lerte elturnigis el malfacilaj situacioj. Li fidele kaj sindoneme helpis Liu Bei kaj lian filon ĝis lasta spiro. La aŭtoro en la romano multe kaj perfekte priskribis lin. Ekz., la ĉapitro "Artifiko de Malplena Urbo" rakontis, ke lia armeo forlasis urbon post malvenko, la malamika komandanto Sima Yi alvenis gvidante grandan armeon. En tiu kriza situacio li ordonis plene malfermi la urbo-pordon kaj kelkajn gardistojn balai ĉe la urba enirejo, dum li mem trankvile sidis en la urbo-turo, sin amuzante per ludo de kordinstrumento kun brulanta incenso apude. Sima Yi bone konis, ke

Zhuce Liang estas diskreta en militado, tial li opiniis, ke estas embusko en la urbo, kaj retiris sian armeon. Kiam tiu denove lanĉis atakon, Zhuge Liang jam foriris senspure. Antaŭ la malplena urbo Sima Yi suspiris, dirante, ke lia talento ja estas multe malpli granda ol tiu de Zhuge Liang. Zhou Yu estis ĉefgeneralo de Wu-regno, li estis juna kaj aroganta. Zhuge Liang faris kun li konkurson pri saĝo, Zhou Yu estis plurfoje venkita kaj laŭte kriis: "Se la ĉielo donis vivon al mi, kial do ankaŭ al Zhuge Liang?" Pro la kolero lia sag-vundo serioziĝis kaj li mortis. Tia priskribo pli reliefigis la superhoman saĝon de Zhuge Liang.

"Ĉe la Akvorando" aperis samtempe kun la historia romano "Tri Regnoj". Ĝi estas romano temanta pri kamparana revolucio. La formiĝo de la du romanoj estis tre similaj. "Ĉe la Akvorando" formiĝis post plurfoja prilaborado fare de literaturistoj surbaze de longtempa popola verkado. Ĝia aŭtoro Shi Nai'an estis samtempulo de Luo Guanzhong. Nun mankas materialo pri lia vivo. Laŭdire, li havis rilaton kun la kamparana ribelo en la lastaj jaroj de Yuan-dinastio aŭ partoprenis en la ribelo.

"Ĉe la Akvorando" en pluraj flankoj montris la leviĝon, disvolviĝon kaj malvenkon de la kamparana ribelo en la lastaj jaroj de la Norda Song-dinastio (960-1127). La ribelo prenis la monton Liangshan ĉe la akvorando kiel sian bazon. La romano firme tenis la ĉefan fadenon "popolanoj ribelas devigite de ŝtataj oficistoj" kaj elstarigis la 108 heroojn pri ilia ribeliĝo. La herooj de Liangshan venis de malsamaj socitavoloj. El ili troviĝis ne nur malriĉaj ĉasistoj kaj fiŝistoj, sed ankaŭ nobeloj, posteuloj de generalaj familioj, grandaj bienuloj kaj etoficistoj. Antaŭ la surmontiĝo ili spertis ĉiu malglatan travivaĵon kaj faris batalon kontraŭ diversaj ferocaj fortoj. Tial la romano prezentis ne nur la ribelajn heroojn, sed ankaŭ la veran socian vivon de la Norda Song-dinastio.

Lin Chong estis tipa ekzemplo tiuflanke. Li antaŭe estis lanca kaj bastona trejnisto de la 800000 gvardianoj de la ĉefurbo. Lia socia pozicio kaj vivmedio faris lin tolerema. La aristokrata filo, tirano Gao Ya'nei senskrupule friponis al lia edzino survoje per pudorofendaj vortoj. Kvankam li sentis ofendiĝon, tamen li toleris foje-refoje. Poste pro insido de la patro de Gao Ya'nei li estis ekzilita al armea furaĝejo, sed li ankoraŭ deziris ripari dometon por vivi humile. Poste Gao Ya'nei kaj lia patro sendis forbruligi la furaĝejon por murdi Lin Chong, sed malsukcesis. Pro la senĉesa persekutado Lin Chong indigne mortigis sian malamikon, forpelis la maljustajn pezantan en la koro dum pluraj jaroj kaj iris al la monto Liangshan por ribelo.

En la romano "Ĉe la Akvorando" almenaŭ 20 homfiguroj estis brile prezentitaj. Malgraŭ la malsamaj rango, pozicio kaj travivaĵo, ili estis justamaj kaj helpemaj. Li Kui estis heroo sukcese prezentita. Li venis de malriĉa familio kaj fuĝis aliloken pro hommortigo. Li estis ribelema al la regantaro kaj helpema

al la amikoj. Kiam lia amiko Song Jiang, kiu poste fariĝis gvidanto de la ribelantoj en Liangshan, estis enkarcerigita, Li Kui volonte lin prizorgis. Por savi Song Jiang el la manoj de ekzekutistoj, li la unua saltis de supra etaĝo de vinbutiko en la ekzekutejon, svingante siajn hakilojn. Li Kui estis ankaŭ bonkora. Foje, kiam Li Gui faris rabon survoje, sin alivestante en Li Kui, li volis mortigi Li Gui, sed subite li aŭdis, ke tiu havas maljunan patrinon hejme, kiun li devas vivteni anstataŭ mortigi la rabiston, li donacis al tiu 10 taelojn da arĝento. Alifoje, liajn orelojn atingis kalumnio, ke Song Jiang perforte prenis al si knabino, li levis tumulton sur la monto kaj volis mortigi Song Jiang. Wu Song estis alia heroo kun legenda koloro. Li sola iris al monto frekventata de tigro kaj

ĝin mortigis per siaj pugnoj. Tio montris, ke li estis superhome forta kaj brava.

Antaŭ la ribeliĝo la herooj de Liangshan plejparte faris batalon apartan, sed alviciĝinte al la ribelanta armeo ilia batalo fariĝis bone organizata kaj pli grandskala. En la romano estas pluraj paragrafoj, kie legiĝas ardaĵ animskuaĵ revoluciaĵ bataloj. La intrigoj estas zigzagaj, striktaj kaj allogaj. Ĉiu ĉapitro estas relative sendependa kaj ankaŭ liganta sin kun la aliaj. La lingvo en la romano estas klara kaj lakona. Ĉu pri rakontado ĉu pri priskribo de personoj kelkaj vortoj jam sufiĉis por prezenti la okazintaĵon kaj vivigi la heroon kaj spirite kaj figure. ■

## EL LA ROMANO “TRI REGNOJ”

# Mirinda artifiko por “pruntepreni” sagojn

(PARTO DE LA 46-A ĈAPITRO)

**K**OMISIITE de Zhou Yu, Lu Su sin direktis rekte al Kongming (alinomo de Zhuge Liang. Antikvece ĉinoj salutis per alinomo por esprimi respekton). Kongming akceptis lin en sian boaton. Ambaŭ sidiĝis vid-al-vide.

“En la lastaj tagoj mi tre okupiĝis pri militaj aferoj kaj ne havis tempon por viziti vin,” diris Lu.

“Ankaŭ mi ne iris gratuli ĉefgeneralon Zhou,” respondis Kongming.

“Kio gratulinda?”

“Gratulinda estas tio, ke Zhou Yu sendis vin sondi mian opinion.”

“Kiel via moŝto scias tion?” Lu Su demandis surprizite.

“La artifiko de lia ĉefgeneral moŝto povas trompi nur Jiang Gan<sup>1</sup>. Cao Cao kvankam estis trompita portempe, li certe konsciis jam sian eraron, sed ne volas konfesi sian trompiĝon. Cai Mao kaj Zhang Yun<sup>2</sup> estis mortigitaj kaj ne ekzistas konsiderindaj malamikoj por via lando. Ĉu tio ne estas gratulinda? Mi informiĝis, ke Cao Cao nomumis Mao Jie kaj Yu Jin ĉefoj de siaj akvaj trupoj. Certe tiuj du pereigos la akvajn trupojn de Cao.”

Aŭdinte tion, Lu Su povis diri nenion. Li ĉirkaŭparolis kelke da tempo kaj adiaŭis Kongming.

“Ne menciuj antaŭ Zhou Yu, ke mi informiĝis pri la nomumo de Cao Cao. Alie en ĵaluzo li serĉos

ŝancon por min atenci,” petis Kongming.

Lu kapjesis kaj foriris. Sed raportante al Zhou Yu, Lu Su ĉion diris pri Kongming.

“Mi neniel lasos lin viva. Mi certe mortigos lin,” diris Zhou Yu en surpriziĝo kaj ĵaluzo.

“Cao Cao eble mokus nin, se ni mortigus Kongming,” admonis Lu.

“Mi mortigos lin en pravigebla motivo, ke li ne sentos maljustecon,” persistis Zhou.

“Kiamaniere?”

“Tion vi scios morgaŭ.”

En la sekvanta tago, vokinte ĉiujn siajn generalojn en sian tendon, Zhou Yu sendis inviti Kongming por milita afero. Tiu lasta kun ĝojo venis.

“Baldaŭ komenciĝos nia batalo kontraŭ la malamikoj. Kiaj armiloj estas la plej gravaj en la batalo sur rivero?” demandis Zhou al Kongming.


“En la akva batalo la plej gravaj armiloj certe estas pafarkoj kaj sagoj,” respondis Kongming.

“Mi tute samopiniis kun vi. Nun en nia armeo ĝuste mankas sagoj. Mi volus peti vin prepari cent mil sagojn por la batalo. Tio estas nia komuna afero. Mi deziras, ke vi ne rifuzu.”

“Se via ĉefgeneral moŝto komisios, mi certe klopodos. Sed kiam mi donos la postulatajn sagojn?”

“Ĉu vi ne povus pretigi ilin en 10 tagoj?”

“Baldaŭ la malamikoj faros atakon. Se la preparado



daŭros 10 tagojn, tio certe fuŝos la aferon.”

“Kiom da tagoj estas bezonataj laŭ vi?”

“Mi plenumos la taskon en 3 tagoj.”

“Ŝerci en armeo estas malpermesate!”

“Kiel mi kuraĝus ŝerci kun via ĉefgenerala moŝto? Mi volonte faros militistan promeson. Se mi tion ne plenumos en 3 tagoj, estu peza puno al mi.”

Zhou Yu ege ĝojiĝis. Li petis la armean juĝiston konservi la skribitan promeson de Kongming kaj proponis al li vinon.

“Mi rekomencos vin post la milito,” diris Zhou.

“Hodiaŭ estas malfrue kaj mi komencu la laboron morgaŭ. Sendu 500 soldatojn al la riverbordo en la tria tago por preni la sagojn!” diris Kongming kaj foriris, drinkinte kelke da taso da vino.

“Ĉu li ne trompas nin?” ekzorgis Lu Su.

“Li mem promesis, sed ne mi lin devigis. Hodiaŭ la arma juĝisto jam prenis lian promesan dokumenton antaŭ la publiko. Eĉ kun flugiloj li ne foriros. Mi ordonos al la metiistoj saboti kaj ne liveri al li la necesajn materialojn por ke li ne povu plenumi antaŭ la limdato. Tiam mi kondamnos lin kaj li neniel povos sin ekskuzi. Vi iru rigardi pri lia afero kaj raportu al mi tuj,” diris Zhou.

Kun la komisio de Zhou Yu, Lu Su venis al

Kongming, kaj Kongming diris: “Mi ja petis vin ne malsekretigi al Zhou Yu, por ke li ne atencu min, sed ekster mia atendo, vi ne volis teni tion en sekreto kaj hodiaŭ denove estiĝis komplikaĵo. Kiel mi povus fari cent mil sagojn en 3 tagoj? Savu min!”

“Kiel mi povus savi vin? Vi mem serĉis la aferon,” respondis Lu.

“Pruntu do al mi 20 ŝipojn ĉiu kun 30 soldatoj. La ŝipoj estu kovritaj per nigraj ŝtofoj kaj starigu pajlajn faskojn ambaŭflanke de la ŝipoj. Tiamaniere mi havos cent mil sagojn en la tria tago, sed ĉifoje vi absolute ne diru al Zhou Yu pri tio! Se li informiĝos pri mia arango, mi malsukcesos,” diris Kongming.

Lu promesis teni la sekreton, kvankam li ne komprenis la artifikon de Kongming. Raportante al Zhou Yu, li ne menciis pri la prunto de ŝipoj.

“Kongming preparas la sagojn ne uzante bambuojn, plumojn, nek gluon,” raportis Lu Su al Zhou Yu.

“Ni atendu, kion li diros post tri tagoj!” nekomprene diris Zhou.

Lu Su sekrete sendis al Kongming 20 ŝipojn kovritajn per nigraj ŝtofoj. Sur ĉiu ŝipo estis 30 soldatoj kaj sennombraj pajlaj faskoj. Kongming faris nenion en la unua tago, kaj tiele ankaŭ en la dua tago. Sed antaŭ la mateniĝo de la tria tago li ŝtele invitis Lu Su al sia boato.

“Por kio vi alvokas min?”

“Ni kune iru preni la sagojn!”

“Kie?”

“Portempe ne demandu! vi vidos baldaŭ.”

Kongming ordonis ĉeni la 20 ŝipojn kaj direkti ilin al la norda bordo. Tiam vualis peza nebulo, kaj super Yangzi-rivero la nebulo estis pli peza, ke oni eĉ ne povis vidi homojn tuj antaŭ si. Kongming ordonis veturigi la ŝipojn antaŭen.

Pasis ĉirkaŭ 2 horoj kaj la ŝipoj proksimiĝis al la surakva defendlinio de Cao Cao. Kongming ordonis, ke la ŝipoj viciĝu laŭlonge de la rivero kun babordo al la norda bordo, kaj la soldatoj kune kriegu kaj tamtamu.

“Kion fari, se la armeoj de Cao Cao sin ĵetos al ni?” ege maltrankviliĝis Lu Su.

“Mi pensas, ke Cao Cao ne kuraĝos sturmi en tiel peza nebulo. Nu, ni drinku, kaj reiru ĉe malapero de la nebulo,” respondis Kongming en rideto.

Aŭdinte la subitan tamtamadon kaj kriegon, Mao Jie kaj Yu Jin haste raportis al Cao Cao.

“Nun peza nebulo kuŝas sur la rivero kaj la malamikoj venis subite. Ili certe faris embuskon. La soldatoj ne moviĝu laŭvole! Sendu pafistojn el akvaj trupoj rezisti per pafado!” ordonis Cao Cao.

Kun tio li ordonis ankaŭ al Zhang Liao kaj Xu Huang<sup>3</sup> gvidi po 3000 pafistojn el la terarmeo al la riverbordo por helpi la akvajn trupojn. Laŭ la ordono Mao Jie kaj Yu Jin jam ordonis al la pafistoj pafi antaŭ sia defendlinio por ke la malamikoj ne rompu la linion. Post nelonge venis ĉirkaŭ dek mil pafistoj el la terarmeo. La sagoj flugis pluve al la ŝipoj koman-

dataj de Kongming sur la rivero. Kongming ordonis turni la ŝipojn, ke la tribordo direktiĝu al la nordo por ricevi pli da sagoj, dum daŭris la kriego kaj tamtama-do. Kiam leviĝis la suno kaj malaperis la nebulo, Kongming ordonis tuj veturi returnen. Nun la 20 ŝipoj havis pajlajn faskojn plenplenajn de sagoj. Kongming ordonis al la soldatoj laŭte krei unuvoĉe:

“Dankojn pro la sagoj!”

Kiam oni raportis tion al Cao Cao, la ŝipoj de Kongming jam veturis pli ol 10 kilometrojn kaj la militŝipoj de Cao ne povis kuratingi ilin. Cao Cao multe bedaŭris.

“Nun sur ĉiu ŝipo estas 5-6 mil sagoj. Mi uzis nenion el via lando, sed akiris cent mil sagojn. Kiel bone, ke morgaŭ ni pafos al Cao Cao per liaj sagoj!” Kongming diris al Lu Su.

“Via moŝto estas superhome genia!” admiris Lu Su kaj demandis: “Kiel vi sciis, ke hodiaŭ estas peza nebulo?”

“Estas sentaŭguloj la generaloj, kiuj ne konas astronomion, nek topografion, ne konas strategion, nek taktikon. Antaŭ 3 tagoj mi jam sciis, ke hodiaŭ certe falos peza nebulo, tial mi kuraĝis preni la taskon. Zhou Yu ordonis al mi plenumi la taskon en 10 tagoj, sed mankis al mi metiistojn kaj necesajn materialojn. Ĉu ne estas evidente, ke li intencis kulpigi min por min kondamni al morto? Sed mia sukceso estas providenca. Kiel Zhou Yu povus sukcesi min mortigi?”

Aŭdinte tion, Lu Su montris sin profunde respekta al Kongming.

Ĉe ilia albordiĝo, ĉe la rivero jam staris 500 soldatoj por transporti la sagojn laŭ la ordono de Zhou Yu. Kongming sciigis, ke ili prenu la sagojn sur la ŝipoj. Sume ili akiris cent mil sagojn kaj portis ilin en la ĉefstabejon de Zhou Yu. Lu Su konigis al Zhou, kiamaniere Kongming akiris la sagojn.

“Kongming estas vere genia. Li estas multe pli saĝa ol mi,” admire suspiris Zhou Yu.

Post nelonge eniris Kongming. Zhou Yu eliris por lin bonvenigi.

“Dispozicio de via moŝto estas admirinda,” diris Zhou.

“Nenio mirinda mia facila artifiko.”

Zhou invitis Kongming en sian tendon por kune drinki.

“Hieraŭ nia suvereno sendis urĝi min al atako, sed al mi mankas bona ideo. Instruu min, mi petas,” diris Zhou.

“Kiel mi, homo filistra, povus havi bonan ideon?” respondis Kongming.

“Hieraŭ mi kaŝobservis la defendlinion de Cao Cao kaj trovis, ke ĝi estas strikte bonorda. Estas malfacile ĝin konkeri. Mi havas kontraŭrimedon sed

ne estas certa pri ĝia efektivebleco. Mi deziras vian helpon por mia decido.”

“Ne eldiru, via ĉefgenerala moŝto. Ni skribu nian rimedon respektive sur la polmon kaj rigardu, ĉu ili estas samaj.”

Zhou Yu konsentis kun ĝojo kaj ordonis pretigi skribilojn. Li la unua skribis ion sur sian polmon kaj donis la skribilojn al Kongming. Ankaŭ Kongming skribis ion en sian manon. Ili proksimiĝis unu al la alia, montris sian polmon, rigardis kaj samtempe ekridegis: Sur la polmoj de Zhou Yu kaj Kongming estis la sama vorto “fajro”.

“Ni ja havas la saman opinion, do mi ne plu hezitas. Tenu tion en sekreto!” diris Zhou Yu.

“Kompreneble, tio ja estas nia komuna afero! Mi pensas, ke Cao Cao kvankam dufoje fiaskis pro mia fajra atako<sup>4</sup>, sed tamen li certe ne ĉerpos instruon. Via ĉefgenerala moŝto certe sukcesos per tiu artifiko.” Post drinko ili disiĝis kaj la aliaj generaloj informiĝis neniom pri ilia interparolado. ■

1. Jiang Gan estis kunlerninto de Zhou Yu kaj subalternulo de Cao Cao.

2. Cai Mao kaj Zhang Yun estis subuloj de Liu Biao, prefekto de Jingzhou. Poste ili kapitulacis al Cao Cao kaj fariĝis ĉefoj de la akvaj fortoj de Cao. Antaŭ la Kampanjo ĉe Chibi, la ĉefgeneralulo Zhou Yu trompis Jiang Gan, ke Cai Mao kaj Zhang Yun jam komplotis kun Zhou Yu kontraŭ Cao Cao, kaj tiu kredis kaj denunciis al Cao Cao. Cao prenis tion vera kaj mortigis Cai kaj Zhang.

3. Zhang Liao kaj Xu Huang estis bravaj generaloj sub Cao Cao.

4. Antaŭ la Kampanjo ĉe Chibi la armeo de Cao Cao dufoje malvenkis en la batalo kontraŭ Liu Bei pro fajra atako aranĝita de Kongming. Laŭ la romano “Tri Regnoj” la unua okazis ĉe Bowangpo kaj la dua ĉe la gubernio Xinye.

## La peranto de “EL POPOLA ĈINIO” en Venezuelo

Samideano

DAVID G. VALECILLOS V.

Calle 79 No. 3C-72

MARACAIBO-4002. VENEZUELO

bonvenigas ankaŭ abonkotiĝojn en ĉiuj latinamerikaj landoj,  
en kiuj ne estas perantoj de ĉi tiu revuo.

**BONVENON AL ABONANTOJ DE “EL POPOLA ĈINIO”  
EN LATINAMERIKO!**

# Chongming-insulo, brila perlo en la draka buŝo

Teksto kaj fotoj de LU GUOYUAN

**P**ER teraplano mi veturis de la movoplena urbo Ŝanhajo al Chongming-insulo, la tria granda insulo de Ĉinio kaj la lasta tero, preter kiu fluas Yangzi-rivero.

Post 50-minuta veturo mi vidis smeraldan ebenan insulon en la ondetanta akvo de la enfluejo de Yangzi-rivero. Se oni komparas Yangzi-riveron kun giganta drako fluganta al oriento, oni vidas, ke Chongming-insulo similas al brila perlo en ĝia buŝo. Oriente de ĝi estas vasta maro, norde estas Qidong- kaj Haimen-gubernioj, Jianguo-provinco, kaj sude trans la

rivero kuŝas Jinshan- kaj Chuansha-gubernioj de Ŝanhajo. La distanco de la orienta ekstremo ĝis la okcidenta ekstremo de la insulo estas 76 km., kaj tiu de la suda ĝis la norda estas 18 km. La insulo havas totalan areon de ĉ. 1 100 km<sup>2</sup>.

## PITORESKA PEJZAĜO

Tuj ĉe surbordiĝo mi estis ravita de la pejzaĝo.


Tie estas urbeto Chengqiao, la sidejo de la Chongming-a Popola Registaro. Ambaŭflanke de la rete

kruciĝantaj larĝaj kaj glataj asfaltitaj stratoj staras vico kaj vico da nove konstruitaj etaĝdomoj kaj magazenoj. La stratojn borderas vicoj da prosperaj arboj, kaj post ili, en florbedoj buntas floroj kaj herboj. Pro tio, ke 7 660 mil arboj kovras 6.7% de la areo de Chongming, la ŝtato honoris Chongming per titoloj "Avangarda Gubernio en Arbarizado de Ebenajaj Loko" kaj "Avangarda Gubernio de Tutpopola Arboplantado".

Jam antaŭ 600 jaroj Zhu Yuanzhang, la fondinto kaj unua imperiestro de Ming-dinastio, baptis


La guberniurbo Chongming







La enfluejo de Yangzi-rivero

Yingzhou-parko  
Foto de ZHANG MING



En la Yuandong-a Fridujo-Fabriko





Chongming-insulon “Yingzhou en Orienta Maro” (Yingzhou estas unu el la tri feaj insuloj en la Orienta Maro, kiel rakontas ĉina mito). Hodiaŭ la insulo fariĝis pli ĉarma. En Yingzhou-parko situanta sudoriente de Chengqiao, oni legis, sportis, promenis aŭ simple ripozis sidante. Krome frekventataj ankaŭ estas la malgranda eleganta Danyuan-ĝardeno, Jin’ao-monto kun pagodo kaj Shou’an-templo plena de incensa fumo kaj recitado de sutroj.

La natura pejzaĝo sur la insulo estas pli ĉarma. Printempe rozetaj persik-floroj kaj blankaj pir-floroj konkuras pri beleco; somere bonodoraj fruktoj peze klinis la arbojn. En serena tago, starante sur la supro de Jin’ao-monto, oni vidas, ke la senlima akvosurfaco de la rivero aspektas kiel giganta bronza spegulo; en vesperkrepusko, rigardante sur la riverdigo la subirantan sunon kaj aŭskultante la fiŝistajn kantojn, mi dronis en plezuro de malstreĉiĝo. Ĉe la urbeto de Chenjiazhen, oriente de la insulo, renkontiĝas la flava riverakvo kaj la blua marakvo, kvazaŭ du batalantaj drakoj. Kiel impona estas la spektaklo! Ĉe Niupeng-haveno, okcidente de la insulo, la norda fluejo de Yangzi-rivero estas funel-forma. En junio kaj julio, la lavanga tajdo bruas tondre. Pro tio la loko fariĝis nepre vizitata por spekti tajdon.

Laŭ invito mi vizitis la

Dongping-an Forstejon oriente sur la insulo. Ĝi, kun areo de 333 hektaroj, estas la plej granda forstejo de Ŝanhajo. En ĝi paŝtiĝas cervogregoj. En ventoblovo kaj bruo de blovata arbaro de tempo al tempo aŭdiĝis cervoblekado, kio multe plezurigis la vizitantojn.

## INSULO KRESKANTA

“Yangzi-rivero alportas 500 milionojn da kubmetroj da leŭso ĉiujare, kiuj sedimentis formante ĉirkaŭ la insulo 1300 hektarojn da plaĝo,” diris al mi la 76-jara emerita inĝeniero Lin Hanqing.

Antaŭ 40 jaroj s-ro Lin komencis sin okupi pri polderigado sur la insulo. De post 1956 li laboris aliloke. En 1975 li emeritiĝis kaj revenis laŭ invito sur la insulon por daŭrigi la polderigadon. Li bone konas la historion de la insulo. Li rakontis al mi, ke en la jaroj de 618 ĝis 626 p.K., sur la surfaco de la buŝo de Yangzi-rivero unuafoje aperis la orienta kaj okcidenta insuletoj. En la postaj jaroj nenombreblaj insuletoj aperadis jen tie jen ĉi tie. Antaŭ 300 jaroj la insuletoj kuniĝis en unu grandan insulon. En la pasintaj 40 jaroj en Chongming oni polderigis 495 kvadratajn kilometrojn da plaĝoj, proksimume al la areo de Chongming-insulo formiĝinta dum 1300 jaroj.

Sur la nova tero fondiĝis sin-

sekve bonrasa kultivejo, forstejo, reprodukta akvoprodukta bredejo, 10 kultivejoj kaj pli ol 20 polderigejoj. La totalaj jaraj industriaj kaj agrikulturaj produktovaloroj de 8 el la 10 kultivejoj atingis 1.17 miliardojn da juanoj, kaj ĉiujare ili liveras al la Ŝanhajaj urbanejoj 80 mil tunojn da bovlakto, 10 mil tunojn da laktaĵoj, 5 mil tunojn da fruktoj, ĉ. 60 mil porkojn, 430 mil kortobirdojn, 2 milionojn da kg. da ovoj kaj 5 mil tunojn da dolĉakvaj fiŝoj.

Multaj lokoj de la insulo estas polderigeblaj kaj cetere daŭre kreskas la insulo.

## PROFITI DE LA NATURO

En la fiŝhaveno ĉe Xijiaqiao oriente de la insulo, kiam venis la sezono de fiŝkaptado, centoj kaj centoj da fiŝipoj en impona vico ekviglis sur la maro. Tiu sceno estas neforgesebla. Kaj pli malfacile forgessebla estas la salikoko-bredejo kun areo de 135 hektaroj. En la rikolta sezono la grandaj viglaj salikokoj estas salivigaj.

Dank’ al sia situo en la kunfluejo de la dolĉa akvo de Yangzi-rivero kaj la sala marakvo, Chongming estas riĉa je akvoproduktaĵoj. Najbare de ĝi, Lushan-, Sheshan-kaj Shengsi-fiŝkapejoj, tre famaj kaj gravaj en Ĉinio, produktas akvo-produktaĵojn je centoj da specoj. La malproksimmara fiŝkapejo etendiĝas de Bohai-marano norde ĝis Fujian-provinco sude kaj ekstera maro oriente. Statistiko de 1988 raportis, ke la kvanto de akvoproduktaĵoj de Chongming atingis 27 milionojn da kg.

Chongming-anoj ankaŭ bredas fiŝojn en basenoj sur poldero. Ĝis la fino de 1984 ili finkonstruis 5 grandajn fiŝbredejojn kun areo de 1000 hektaroj. Ĝi produktas ĉiujare 700 mil kg. da fiŝoj kaj per tio fariĝis unu el la tri grandaj fiŝ-bazoj en la antaŭurbo de Ŝanhajo.

Chongming-insulo liveras ankaŭ tre valorajn krabidojn kaj alvusojn. De 1974 ĝis 1984 Chongming liveris 84 mil kg. da krabidoj al 22 provincoj kaj urboj kaj eksportis 6000 kg. da angilaj alvusoj ĉefe al Japanio.



## LEVIĜANTAJ INDUSTRIOJ

Vere la fiŝkaptado disvolviĝis rapide, sed la ekonomia impeto de la insulo dependas ĉefe de la nove leviĝantaj industrioj. En 1988 la totala industria kaj agrikultura produktovaloron estis 2610 milionoj da juanoj, el kiuj 2330 milionoj da juanoj estis la industria produktovaloron. Sed antaŭ 1949 56% de la Chongming-aj financaj enspezoj venis el la kampaj impostoj. Statistikoj montris, ke la insulo posedas pli ol 1400 diversajn industriajn entreprenojn, kiuj produktas pli ol 1100 specojn da produktaĵoj.

Nordokcidente de Chengqiao sidas la Yuandong-a Fridujo-Fabriko, fama pro sia fridujo kun la marko "Ekstrema Oriento". Ĝi, la unika kolektiva entrepreno inter la 42 ĉinaj fridujo-fabrikoj taskataj de la ŝtato, produktas jare 128 mil fridujojn, kies kvalito okupas la 11-an lokon inter la 19 A-klasaj produktaĵoj de Ĉinio. En 1988 ĝiaj produktvaloroj kaj profito ĉiuj okupis 1/10 de tiuj de la tuta gubernio. Tio pruvis la influon de la novaj industrioj sur la ekonomion de Chongming.

Por la Hugang-Huatong-a Lana Tekstila Kompanio Limigita, ekfunkciinta aŭguste de 1988, oni investis entute 5.5 milionojn da usonaj dolaroj. Ĝi, unu el la plej grandaj vilaĝaj kaj urbaj entreprenoj financitaj de Ĉinio kaj aliaj landoj ne nur en Chongming, sed ankaŭ en Ĉinio, planis retiri en 5 jaroj la totalan investon. Ĝi produktas diverskolorajn kaj diversnormajn fadenojn el ŝaflano, leporlano kaj ŝafida lanugo per ŝpinaj, tinkturaj kaj teksaj maŝinoj importitaj el Italio, Pollando kaj Japanio. La kompanio uzas nur aŭstralian lanon kaj vendas siajn produktaĵojn eksterlande. Tia administra maniero konformas al la celo de Ĉinio en la strategio de la ekonomia disvolvo en la marbordaj regionoj.

Teksejo Printempa Vento estas alia ekzemplo. Antaŭ 16 jaroj la 56-jara kamparano Qian Xuebang, gvidante pli ol 20 virinojn de sia vilaĝo, establis en pajla kabano teksejon Printempa Vento per 4000 juanoj kolektitaj. Ili produktis dre-

likon per kelke da malmodernaj teksiloj movataj de homaj piedoj. En 1983 li rekonstruis la tutan fabrikon per 2 milionoj da juanoj pruntitaj de la banko. De katizado de fadenoj ĝis pretigo de ŝtofo, la tuta procedo estis aŭtomata. De tiam ĝia jara produktovaloron ĉiam duobligis kaj atingis 12.35 milionojn da juanoj en 1988. La fabriko posedas fiksan kapitalon de 6.5 milionoj da juanoj, 450 laborantojn kaj kvitigis sin en la pasinta jaro. Nun s-ro Qian kaj Huaweitai-a Komercita Limigita Kompanio de Hongkong estas diskutantaj pri fonda de kunfinanca entrepreno, esperante duan antaŭensalton de la fabriko. Tio montras la malproksimvidan novtipan kamparanon de Ĉinio.

## DISPOZICIO PRI LA ESTONTECO

"Chongming troviĝas en la grava epoko de ekspluato kaj prosperiĝo," diris al mi guberniestro Tian Changchun dum mia intervjuo.

La 52-jara s-ro Tian sin okupis longtempe sur la insulo pri projekto kaj konstruo de elektrolivero. En 1984 li estis elektita kiel guberniestro. Li, entuziasma altklasa inĝeniero plena de bela revo al la estonteco, diris al mi, ke ili ekspluatos kaj

disvolvos Chongming en tri paŝoj. La unua: de nun ĝis 1990 gajni jaran industrian kaj agrikulturan produktovaloron de 3000 milionoj da juanoj. La ĉefa laboro estas akumuli ekonomian forton por la venonta disvolvo. La dua: en la 10 jaroj de 1991 ĝis 2000, reguligi la produktajn aranĝojn kaj industriajn strukturojn. La celo: konstrui 5 grandajn bazojn, t.e. bazon de manĝaĵoj de lokaj gustoj, bazon de eksportataj agrikulturaĵoj, bazon de senpolucia prilaborado, bazon de transigado de rivera-mara transporto kaj bazon de turismo. La tria: de 2001 ĝis 2050, transformi Chongming en insulon kun prospera ekonomio, oportuna trafiko, bela medio, avangardaj scienco kaj tekniko kaj riĉa popola vivo, en evoluanta novan ekonomian regionon apertan al la eksterlando.

La chongming-anoj konsciencie penas por realigi tiun belan planon. Ekz., en la 5 ĉefaj havenoj de la insulo estas nur 2 mil-tonelaj kajoj kaj la ceteraj estas malpli grandaj. Nun dekmil-tonela kajo estas konstruata en la haveno Zhangwang, kiu ekfunkcios en la unua jardeko de 1990 kiel bazo por martransporto. Kaj cetere oni planis konstrui ĉe la marbordo de la insulo modernan havenon kun dekmil-tonela kajo servanta al oceana transporto. ■



En foiro



Nova turisma vilaço

Sur kampo




# Floraj kaj birdaj pentraĵoj de Ĉinio (I)

Teksto de WANG XIUQIN

**F**LORAJ kaj birdaj pentraĵoj estas unu el la specoj de la ĉinstila pentraĵaro, kiu ĉefe prezentas florojn, birdojn kaj bestojn.

Kiam aperis la pentrarto? Nun oni ne povas fari precizan respondon. Estas belaj floraj kaj birdaj desegnoj sur ceramikaĵaj frag-

mentoj, ostaj kaj eburaj gravuraĵoj, elterigitaj en neolitikaj ruinoj ĉe Hemudu antaŭ 7000 jaroj. Sed kiel sendependa pentrarto la flo-



Birdo sur fruktarbo (Song-dinastio)

de LIN CHUN

raj kaj birdaj pentraĵoj aperis en la periodo de la dinastioj Sui kaj Tang (581-907). Tiutempaj floraj kaj birdaj pentraĵoj havas originalan stilon en kolorado kaj tuĉado. En la lastaj jaroj de la meza periodo de Tang-dinastio aperis nombro da famaj pentristoj, kiaj Xue Ji (Ŝjue Ĝji), majstra en pentrado de grupoj, Bian Luan, kiun oni nomas kreinto de floraj kaj birdaj pentraĵoj. Bian majstris en pentrado de pavoj, deŝiritaj floroj, abeloj, papilioj, raraj floroj kaj kuriozaj birdoj. Lia pentraĵo estas per tuĉaj linioj konturita kaj ĉarme

Birdo sur neĝkovrita arbo (Song-dinastio) de LI DI



kolorigita. Tio estas nomata delikatinia kaj intenskolora flora kaj birda pentraĵo. La formo de deŝiritaj floroj estis populare uzata de la pentristoj en la meza kaj lasta periodoj de Tang-dinastio, kaj ĝi estas ankaŭ unu el la originalaj naciaj formoj de ĉinaj floraj kaj birdaj pentraĵoj. "Magnolio" pentrita de Bian Luan estas tute diferenca de okcidenta pentraĵo de florbukedo envaza. Ĝi prezentas eĉ delikatajn radiketojn kaj sekve donas al la rigardantoj eblon imagi. Tiamaĵ floraj kaj birdaj pentraĵoj sin karakterizas per delikataj tuĉlinioj, intensaj koloroj, versimileco kaj pompeco.

En la periodo de Kvin Dinastioj (907-960) la arto de floraj kaj birdaj pentraĵoj eniris sian maturan etapon. Formiĝis du pentrartaj skoloj kun Huang Quan (Hŭang Ĉjŭan) kaj Xu Xi (Ŝju Ŝji) kiel reprezentantoj, kiuj metis ĉefan bazon por ĉinaj floraj kaj birdaj pentraĵoj. En pentrado Huang Quan unue konturis silueton de objekto per maldikaj kaj maldens-tuĉaj linioj kaj poste ĝin kolorigis. Liaj pentraĵoj estas kun delikataj tuĉlinioj kaj helaj koloroj. Xu Xi uzis teknikon de plurfoja tuĉado kaj ioma kolorado. La du skoloj influis unu la alian kaj konkuris inter si, kio akcelis la disvolviĝon de la arto de floraj kaj birdaj pentraĵoj. Nun ekzistantaj verkoj de Huang-skolo estas "Raraj Birdoj" de Huang Quan kaj "Perdriko kaj Pasero" de lia filo Huang Jucai (Hŭang Ĝjucai). La du pentraĵoj, konturitaj per tuĉaj linioj kaj nuancitaj per koloroj kaj maldensa tuĉo, estas delikate faritaj. Krome, Huang Quan kreis sentuĉlinian pentrarton, t.e. fari pentraĵon per koloroj, sen tuĉlinia konturo.

Song-dinastio (960-1279) estis prospera periodo de floraj kaj birdaj pentraĵoj. La elstara pentristo de floraj kaj birdaj pentraĵoj Zhao Chang (Ĝaŭ Ĉang) tre zorgis personan observon kaj skizadon. Li variigis tuĉliniojn per duobla kon-

turado kaj uzis intensajn kaj ĉarmajn kolorojn, ke floroj kaj herboj sub lia peniko estas versimilaj. La verkoj de Li Anzhong (Li Anĝong) estis elegantaj, teknike lakonaj kaj esprimriĉaj. Cui Bai ŝatis pentri fragmitojn kaj sovaĝanserojn ĉe sabla insuleto, li estis lerta en konturado, kolorado per helaj kaj lindaj koloroj. La de li pentritaj birdoj estas delikataj, versimilaj kaj viglaj, sed arboj, herboj kaj montoj estas pentritaj libermaniere. Lia pentra stilo estas libera de la kateno de Huang-skolo. Zhao Ji (Ĝaŭ Ĝji), imperiestro de Song-dinastio, heredante la stilon de Cui Bai, akcentis skizadon kaj havis delikatan observon al objektoj. Liaj pentraĵoj estas delikate faritaj kaj versimilaj. Li estis majstra en pentrado de floroj kaj birdoj. Laŭdire li pentris birdajn okulojn per kruda lako, ke ili aspektas vivaj. Pentristo Lin Chun lertis prezenti naturan aspekton de birdoj. Li estis laŭdata kiel majstro en skizado. "La orioj sub lia peniko estas kvazaŭ elflugontaj el la pentraĵo." Ankaŭ Li Di estis eminenta en skizado. De li pentritaj turtoj en malvarma vintro donas tian efekton, ke ilin vere turmentas malvarmo.



En tiu periodo estiĝis literaturistaj pentraĵoj. Kun plivastiĝo de temoj de floraj kaj birdaj pentraĵoj kaj pliriĉiĝo de esprimaj teknikoj, aperis nombro da literaturisto-pentristoj, kiuj aparte ŝatis pentri bambuojn. Inter ili Wen Tong kaj Su Shi estis la plej famaj. Ili iniciatis, ke pentrarto kombiniĝu kun literaturo por esprimi individuan senton, ke oni uzu ne kolorojn, sed nur ĉinan inkon en pentrado por esprimi tuĉan varion. Ili prenis umeflorojn, orkideojn, bambuojn kaj krizante-mojn kiel ŝatatajn temojn por esprimi sian liberamon, senĝenecon kaj amon al idilia vivo. Tio montris ilian penson kaj senton sin apreci kaj vivi ermite. ■





鸚鵡飛爭翔  
 上目如斜  
 理何事助  
 秀剛：燥枝  
 良嶽秋倫  
 童襟早應  
 庚辰春  
 出乾候  
 世法悲  
 千載下  
 想係傳  
 真

Papagoj (Song-dinastio)

de ZHAO JI





Lotusfloro (Song-dinastio)


de YI MING

Raraj birdoj (Kvin Dinastioj)

de HUANG QUAN

Birdoj en vintro (Song-dinastio)

de CUJ BAI





Kampara preĝejo en Norfolk

de **SIMON HEWITT** (Britio)

Vesperiĝo de Amsterdamo

de **MARIËT HOOGELAND** (Nederlando)

